

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Unua Azia Kongreso
Debateroj en *Influo*
Kio estas LingvoFesto?

Bibliotekoj:
La defioj de komput-epoko

Enhavo

- 181 Azio: Kontinenta kongreso ekzemplas sekvinde (Puramo Chong, TAKEUTI Yosikazu); Marĝenaj kritikeroj (YAMASAKI Seikō)
- 182 IEM revolucias siajn servojn (intervjuo kun Herbert Mayer); Datumbankoj ĉe IEM; Internacia Esperanto-Muzeo (adresoj, horaro)
- 184 Eksteraj rilatoj: Du invitoj el Parizo (François Lo Jacomo); Parlamenta donaco dank' al Esperanto (Spomenka Štimec); Ĉu komisiito pri arabaj landoj?
- 185 Fakaj asocioj/Eksteraj rilatoj: Handikapuloj: dek jaroj da kunlaboro (Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj); Du neŭtralaj lingvoj (Reinhard Fössmeier)
- 186 Kalendaro 1996-97
- 187 Belartaj Konkursoj de UEA en 1997
- 188 Junularo: Gufujo establiĝas, financo premas (Danny ten Haaf, Rolfo, Jukka Pietiläinen)
- 189 Speciala sekcio: *Influo* numero 12
Ĉu *Esperanto Hodiaŭ*? (Edmund Grimley Evans, Edmond Ludwig)
Sekvi la celon ĝuante (Aleksandro Gofen)
For la amatorecon! (Oszkár Princz)
Informado? Mi ne komprenas (Ziko M. Sikosek)
- 193 Recenzoj: *Vocabolario italiano-esperanto* (Wim Jansen, Marisa Jansen-Miglioli); *La dezerto de la Tataroj* (Carlo Minnaja); *Dekamerono. Unuaj tri tagoj* (Fernando de Diego)
- 195 Laste aperis
- 196 Informado/Instruado: Festi lingvojn per fulmokursoj (intervjuo kun Dennis Keefe)
- 197 Historio: Pioniro obstina kaj eltenema (Hans-Burkhard Dietterle)
- 198 Persone – Fake; Abontarifoj 1997 de la Libroservo de UEA
- 200 Nekrologoj; Anoncetoj; Oficiala Informilo

Vi trovos

ke nia ĉefartikolo, intervjuo kun Herbert Mayer pri Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (p. 182-183), jam en novembro heroldas la 15-an de decembro, la Tagon de la Libro, okaze de kiu estas “morala devo de ĉiu ‘vera’ e-isto aĉeti minimume unu E-libron” (Ŝirjaev). Ĉi tiu frua memorigo lasas al vi sufiĉe da tempo por elekti akirindaĵojn en via libro-servo loka, landa aŭ tutmonda. Por sugesti ĝenron: en la jaro de Esperanta teatro (temo al kiu ni revenos en decembro), kial ne aĉeti *Songe sub pomarbo* de Baghy, aŭ, traduke, *Aŭdienco* de Havel? Aŭ, proze kaj vortare, la italajn verkojn kiujn ĉi tiu numero recenzas (p. 193-194)?

Sojle al la nord-hemisfera vintro, estas varmige rememori la some-rajn kongresojn de la junularo (p. 188) kaj de sescento da azianoj (p. 181). “Kalendaro” (p. 186) pensigos vin jam pri la venontaj printempo kaj somero.

La diskuto vekita de Z.M. Sikosek, pri E-ideologio kaj ties praktikaj implicoj, daŭras plu, ĉi-foje en *Influo* (p. 189-192), kies unua “jarkolekto” kiel suplemento al nia revuo jene fariĝas kompleta.

La kovrilo: La ĉefa biblioteko de Nov-Delhio. (Unesko/P. Almasj)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anontarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:    

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ✉+39-6-39-72-61-69; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉+31-50-3613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ✉+1-613-565-9279; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Kontinenta kongreso ekzemplas sekvinde

Aziaj esperantistoj bezonas siajn proprajn kongresojn por ĝui internaci-skalan Esperanto-eventon sen multe da elspezo. Tio estis unu el la motivoj por la okazigo, planita ekde la Seula UK (1994), de la Unua Azia Kongreso (21-25 aŭg., Ŝanhajo), kiun partoprenis 584 homoj el 18 landoj.

La solena malfermo okazis en la granda, preskaŭ plena aŭditorio de la Komerca Centro de Ŝanhajo. Sur la podio oni vidis ne nur gvidantojn de la azia E-movado, sed ankaŭ reprezentantojn de la subtenantaj instancoj ŝtataj kaj municipaj. Bonvenigis al sia urbo YE Gongqi, prezidanto de la

Kunsidon por reprezentantoj de E-organizoj en Azio ĉeestis samideanoj el Ĉinio, Koreio, Japanio, Pakistano kaj eĉ Aŭstralio, por diskuti ĉefe pri la pliiĝustigo kaj pliefikigo de la aziaj projektoj de UEA, kaj pri la nuna stato de Azia Fondaĵo. Eĉ pli ofte ol planite devis kunsidi Komisiono pri

kaj trafike faciligos la partoprenon al pli multe da e-istoj el la “progresantaj landoj”.

La kongresanoj povis ankaŭ amuziĝi kaj fari duontagan ekskurson en la plej granda ĉina urbo, lulilo de nia movado en Azio. Tri prelegoj cetere temis pri Eroŝenko, Elpin kaj Verda Majo, diversnaciaj gepioniroj kiuj aktivis en ĉi tiu histori-riĉa urbo.

Neforgesindas la sinifero de LKK kaj de KAEM, kiu fundamentis la sukceson de la kongreso. KAEM-anoj prepar-kunsidis tri fojojn kun LKK-anoj, fluginte al Ŝanhajo je propra kosto. Ĉina E-Ligo sendis al la urbo veteranan fakulon por helpi la preparojn. La lokaj esperantistoj, kun ĉekape d-ro WEI Yuan-shu, harmonie plenumis siajn penajn taskojn. Ili montris modelon sekvidan de estontaj Aziaj Kongresoj. La riĉa rikolto de la Unua Azia Kongreso pravas ke KAEM estos bona modelo por transnacia regiona kunlaboro de esperantistoj, se ĝi estos tute demokratie administrata de samideanoj el la landaj asocioj kiuj fakte kaj efektive reprezentas la agadon de la koncernaj landoj.

*Laŭ raportoj de Puramo Chong (Koreio)
kaj TAKEUTI Yosikazu (Japanio)*



Konstanta Komitato de la Ŝanhaja Popola Parlamento. Salutis LI Bingqiu, vicprezidanto de Ŝanhaja Federacio de Soci-sciencaj Asocioj, kaj DAI Weidong, rektoro de Ŝanhaja Universitato pri Internaciaj Studoj. Kortuŝis mesaĝo de la 92-jara verkisto Bakin, Honora Patrono de UEA, kiu pro malsano ne povis ĉeesti.

La ĉefa kongresa temo, “Azio kaj la 21-a jarcento”, dividiĝis al kvar subtemoj: ekonomio, scienco, edukado kaj E-movado. Aŭdinte prelegojn de fakuloj, la kongresanoj libere diskutis pri la temoj. (Oni ofte kritikis la “diskretan sintenon” de azianoj en debatoj, sed ĉi-kongrese la opini-esprimoj estis sufiĉe viglaj.) Dum la kvar vesperoj kaj kvin tagoj de la kongreso abunde paralelis, eĉ koliziis programeroj laboraj, fakaj, edukaj kaj distraj. Kunsidis medicinistoj, go-ŝatantoj, anoj de Oomoto, fervojistoj, komercistoj kaj ekonomiistoj. Oni pritraktis temojn kiujn ne nur e-istoj alfrontas en la ĉiutaga vivo: “seksa diskriminacio kaj virino”, aŭ la historion de rilatoj inter Japanio kaj Koreio.

Azia E-Movado (KAEM), ĉefe pro la duobla kandidatiĝo — ĝojiga kaj kuraĝiga — de Bharato kaj Vjetnamio por inviti la Duan Azian Kongreson en 1999. Post serioza kaj vigla diskuto, KAEM elektis Vjetnamion: ĉefe pro ties geografia situo, kiu ekonomie

Marĝenaj kritikeroj

La kongreso estis rimarkinda sukceso, sed ankaŭ montris al ni ekster Ĉinio la larĝan diferencon de niveloj inter Azio kaj Eŭropo.

La ĉefa bedaŭrindaĵo estas la neutiligo de la organizaj spertoj akumulitaj dum la Pekina UK (1986) kaj la Pacifika Kongreso (1992). Tio tamen estis antaŭvidebla en Ĉinio, kie moviĝon enlandan malhelpas alta veturkosto.

Venis al la kongreso ankaŭ tiuj kiuj interesiĝas nur pri propra negoco. En la kunsido de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, mia kunprezidanto WANG Tianyi flustris al mi ke la plej multaj en la salono nenion komprenas. Ili okupiĝis nur pri individuaj negocoj, en la ĉina.

Komercismo kolorigas la tutan ĉinan socion. En postkongreso nia ĉiĉerono (neesperantista) eĉ koleris kiam ni insistis viziti historiajn lokojn anstataŭ butikojn, malaltigante lian makleraĵon.

Por decidi pri la sekva kongresurbo oni arde diskutis, eĉ kverelis, sed fine favoris Vjetnamion. Mi persone preferus Bharaton, ĉar tie la preparlaboroj progresis pli ol en Vjetnamio, kie la E-asocio ankoraŭ ne akiris registaran agnoskon, nepran por okazigo de internacia kunveno.

YAMASAKI Seikō (Japanio), laŭ pli detala raporto en La Eta Gazeto

IEM revolucias siajn

Dank' al siaj riĉeco kaj oficiala statuso, Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEM) elstaras inter niaj bibliotekoj. Antaŭvide al la proksimiĝanta Tago de la Esperanta Libro (15 dec.), ni intervjuis direktoron Herbert Mayer.

Kiel precize situas IEM en la organiza strukturo de la Aŭstria Nacia Biblioteko?

En ANB ekzistas pluraj sekcioj nomataj kolektoj, i.a. Internacia Esperanto-Muzeo, Kolekto por Planlingvoj: jen ĝia oficiala nomo. Ĝi estas la plej malgranda sekcio, kun certa organiza memstareco, tamen strikte ligita en la ĉefaj punktoj al la regularo de ANB: ni ekzemple ne havas buĝetan suverenecon, en nia publika laboro ni devas akordiĝi kun la ĝenerala linio, la reguloj por utiligi nian materialon estas tiuj de ANB ktp.

Laboras nun en IEM tri bibliotekistoj (Christian Cimpa, Helga Farukuoye, Herbert Mayer), tamen ne plentempe, ĉar ili havas taskojn ankaŭ en aliaj partoj de ANB. En la nuna tempo de drasta redukto de la ŝtataj elspezoj estas imageble ke iam ni laboros malpli longe en IEM. Tamen eĉ se ŝanĝiĝus organizaj strukturoj, nia biblioteko ĉiam estos utiligebla, prilaborata kaj ampleksigata: tion garantias la fakto ke IEM estas publika biblioteko.

Kiom da bibliotekaj unuoj posedas IEM, kaj kiajn?

Oni povas aserti ke IEM estas la plej ampleksa biblioteko de Esperanto kaj planlingvoj. Ni klopodas akiri ĉion novan, kaj tiel la kolekto kreskas en la lasta tempo ĉiujare per ĉ. 500 libroj. Nuntempe estas 21 000. Ĉar nia aĉeta buĝeto estas ege malgranda, ni dependas rekte de donacoj de eldonantoj. Sed nur malmultaj sendas regule siajn novaperaĵojn, kio kaŭzas al ni grandan penon kaj streĉon.

Krom libroj ni vere kolektas ĉion kio koncernas nian lingvon: ni havas 40 000 flugfoliojn, pli ol 10 000 fotojn, 353 sondokumentojn, 1000 afiŝojn, 12 000 gazet-eltondaĵojn ktp. Ne mankas kuriozaĵoj, kiel parto de funebra rubando el la enterigo de la E-pioniro Trompeter, alumet-skatoletoj, kruĉoj kun Esperanta surskribo ktp ktp.



Kiel aspektas via ĉiutaga laboro?

IEM konsistas el du partoj: la muzeeto kaj la biblioteko. Ĉi lastan utiligas preskaŭ ekskluzive esplorantoj. Rimarkinde, la lokaj e-istoj apenaŭ uzas la bibliotekon. La dokumentojn ni disponigas surloke aŭ — plej ofte — pere de la internacia teleprunta reto de la ĉefaj sciencaj bibliotekoj eŭropaj. Al la muzeo venas ankaŭ esperantistoj (10%), tamen 90%-e vizitas scivolemaj turistoj. Pro tio ni faras en la muzeo fundan informan kaj varban laboron. En unu jaro pasas tra IEM inter 3000 kaj 4000 personoj, kies prizorgo okupas preskaŭ duonon de nia labortempo. En 1993 ni atingis la rekordan nombron de 7000 vizitantoj, klarigeblan pro politikaj ŝanĝoj ĉe niaj orientaj najbaroj.

Kiel oni uzu la internacian pruntan reton?

Nu, almenaŭ en Eŭropo oni povas pruntepreni niajn librojn pere de sciencaj kaj universitataj bibliotekoj, indikante ke la libro troviĝas ĉe ni. Ni ne pruntas unikaĵojn, manuskriptojn, gazetojn, sed eblas mendi kopiojn.

Datumbankoj ĉe IEM

BIBOS. La katalogada sistemo de la aŭstraj sciencaj bibliotekoj. Serĉlingvoj: germana kaj angla. Respondeculo ĉe IEM: Christian Cimpa. Ĝi enhavas jam proks. 2000 Esperanto-librojn katalogitajn ĉe ni ekde 1990. Ĉiu nove alvenanta libro eniras ĉi tiun sistemon. Ni paralele prilaboras la librojn venintajn inter 1980 kaj 1990. Jam konsultebla en Interreto: <http://bibgate.univie.ac.at/>.

TROVANTO. La specifa IEM-katalogo, priskribanta nur dokumentojn kiuj troviĝas en IEM. Pli fleksebla ol

BIBOS, ĝi ebligas pli specifajn serĉodemandojn. Lingvo: Esperanto. Respondeculo: Helga Farukuoye. Konsultebla ekde marto 1997. Ĝi tiam enhavas 1000 titolojn. En ĝin eniros iom post iom la tuta posedaĵo de IEM.

Du pliaj elektronikaj katalogoj estas planataj: afiŝa kaj bildmateriala. Konsulteblaj verŝajne nur fine de 1997. Speciale la bilda datumbanko **IMAGO** estos granda helpo por eldonantoj de gazetoj: per Interreta vizito facile konstateblas kiuj fotoj estas disponeblaj por reproduktado.

Tiuj kvar datumbazoj formas kune la plej ampleksan Esperanto-katalogaron de la historio.

servojn



IEM-direktoro Herbert Mayer (dekstre) insistas: "Ni estas tute normala biblioteko."

Foto: IEM

Fakte, kion povas vidi vizitanto de IEM?

La publika parto konsistas el tri salonoj: unu estas por la muzeo, dua servas kiel legejo, kaj la lastan ni nun pretigas kiel informojn pri Esperanto. En la lastaj du jaroj okazis funda renovigo: ni akiris novajn vitrinojn, legotablojn, bonan aŭdvidan ekipaĵon, tiel ke ni povas prezenti Esperanton en tute deca kaj alloga maniero.

Muzeo pri tiel ampleksa temo kiel lingvo ĉiam alfrontas dilemon. En nia muzeo ni povas tuŝi nur kelkajn aspektojn de la kompleksa fenomeno Esperanto. Ni tamen klopodas kompreni ke nia lingvo havas historian dimension, ke ĝi fariĝis kultura faktoro kun propra literaturo.

De longaj jaroj okazas diskutoj por kunordigi la laboron kaj sistemojn de la grandaj E-bibliotekoj. Ŝajnas ke, dum aliaj diskutis, IEM preferis iri sian propran vojon.

Kiel dirite, IEM estas strikte ligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko. Tial ĝi ne povas akordiĝi kun aliaj E-bibliotekoj pri demandoj kiel dokument-priskribaj reguloj, uzendaj hard- kaj softvaro ks. Sed la avantaĝoj por IEM estas pli grandaj: ĉiuj niaj reguloj, la komputilaj sistemoj ktp. estas diktataj de plej granda profesieco.

Vi jam parolis pri la tradiciaj servoj de IEM: eblas studi surloke, teleprunti, peti informojn kaj kopiojn. Dank' al Interreto, viaj servoj certe multobliĝos.

La informteknika revolucio direktas tute novajn defiojn al la biblioteko. IEM realigas pro tio projektojn necesajn

por resti ĝisdata en siaj servoj. Ni kreas nuntempe datum-bankojn alireblajn per Interreto [vd. kadron sur p. 182].

Necesas diri ke dank' al tiuj datumbankoj alvenos la horo de la vero: evidentigos ĉu la esperantistoj bezonas tian bibliotekon aŭ ne. Se ili ne utiligos la datumbankojn TROVANTO aŭ IMAGO, tiuj malaperos sufiĉe rapide. Oni povos tre facile kontroli ĉu ili estas utiligataj. Se la esperantistoj ne vizitos ilin por elsuĉi la necesajn kilobajtojn, jen estos fino. Tio minacus la ekziston de IEM entute. En tempo de rigora ŝparado ne estos mono por luksaĵoj.

Se pri servoj temas: ĉu ĉiuj viaj klientoj estas kontentaj?

Nu, la laboroj menciitaj estas sufiĉe temporabaj. Tion foje movaduloj ne komprenas kaj postulas de ni servojn tute fremdajn al la karaktero de nia instituto. Ne estas ekz. nia tasko superŝuti per pet-skriboj politikistojn aŭ peri tranoktadojn en Vieno. IEM estas ŝtata biblioteko, ne asocio kun movadaj celoj. Nia informa agado celas ne trudi jam trivitajn kliŝojn al la homoj, sed gardi ian objektiveton en la prezento. Krome, la angla ne estas nia malamiko.

Pli ol biblioteko, IEM funkcias eĉ kiel ia kultura E-centro por plurlande vasta regiono.

Dum la lastaj dek jaroj ni organizis ĉ. 30 diversajn aranĝojn, precipe tre sukcesajn kulturajn semajnfinojn kiuj altiris e-istojn el la mez-eŭropa regiono. Certe ni daŭrigos tion. Menciindas ke tiujn aranĝojn ĉeestas nur malmultaj homoj el la tradicia loka movado — venas prefere eksterlandanoj kaj studintoj de niaj korespondaj kursoj. Per ĉi tiuj kursoj ĉ. 1200 personoj en la lastaj dek jaroj eklernis en Aŭstrio Esperanton; certe dekono el ili finis eĉ la progresigajn kursojn, kio signifas ke ili multe pli bone konas ne nur la lingvon, sed ankaŭ niajn historion kaj literaturon, ol averaĝa samideano. Sed estis neeble integri tiujn novajn homojn en la lokan movadon. Preskaŭ ĉiuj malaperis — kelkaj tamen venas al niaj aranĝoj kaj abonas nian revuon. Mi kredas ke ni devus serioze analizi la kialojn de tio. La konkludoj verŝajne ne tre flatus la ĉilandajn E-rondojn, kaj pro tio oni tabuas tiun temon.

Fine, se bona feino plenumus iun deziron vian pri la muzeo, kion vi dezirus?

La avantaĝojn de la jura statuso de la muzeo mi jam antaŭe skizis: la ŝtateco de IEM garantias ĝian ekziston. Sed ŝtataj entreprenoj ofte estas iom lantaj: dek jarojn ni devis batali por ricevi belajn vitrinojn, dek jarojn por la instalo de bone videblaj, belaj vojmontriloj al nia muzeo. Mia deziro estus ke tiaj bazaj aferoj ne bezonu tiom da tempo kaj energio: mi deziras malpliigon de inercio. ★

Internacia Esperanto-Muzeo

(Internationales Esperanto-Museum der Österreichischen Nationalbibliothek, Sammlung für Plansprachen), Josefsplatz 1, AT-1015 Wien, Aŭstrio.

Publikaj horoj: lunde, vendrede: 10–16h00; merkrede: 10–18h00. **En septembro:** fermita kaj vizitebla nur post antaŭanonco.

Telefono: +43/222/535-51-45.

Retpoŝtaj adresoj de la bibliotekistoj: mayer@grill.onb.ac.at; faru@grill.onb.ac.at; cimpa@grill.onb.ac.at.

Hejmpaĝo: <http://www.onb.ac.at/intespm.htm>.

Du invitoj el Parizo

Antaŭ unu jaro kelkaj estraranoj vizitis la centrojn de pluraj ne-registaraj organizoj en Parizo (dec. '95, p. 207). Du el tiuj kontaktoj ĵus ricevis daŭrigon: Internacia Asocio de Universitatoj letere esprimis intereson pri kunlaboro kun UEA, kaj Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj (MFSL) invitis UEA-reprezentantojn al sia datrevena simpozio.

Fondita en 1946, MFSL estas ne-registara organizaĵo kunlaboranta kun Unesko (A-kategorio), havanta membrojn (sindikatojn kaj sciencajn organizaĵojn) en kvindek da landoj. Iam subtenata de sovetiaj sindikatoj, ĝi havas kiel ĉeftemon la "socian respondecon de sciencaj laboristoj" (universitatoj, esploristoj, inĝenieroj ktp). Jam estis kontaktoj inter ĝi kaj la

geologia sekcio de Internacia Scienca Asocio E-ista, kaj pasintoktobre Amri Wandel kaj François Lo Jacomo vizitis ĝian ĝeneralan sekretarion André Jaeglé en Parizo.

Okaze de sia kvindekjariĝo, MFSL okazigis en la Pariza sidejo de Unesko, de la 16-a ĝis la 18-a de septembro, internacian kolokvon pri "Scienco, etiko kaj socio", kiun parte ĉeestis Lo

Jacomo kaj Renée Triolle. Antaŭ ĉ. ducent partoprenantoj, dudeko da prelegantoj tuŝis diversajn aspektojn de la problemoj (i.a. atom-armilojn, bioetikon, informadikon), klopodante difini la rolon de sciencistoj, de internacia juro kaj de ekonomiaj povoj fronte al etikaj demandoj. La esperantistoj ne povis interveni dum la pleno, sed rekontaktis la ĝeneralan sekretarion, konfirmanke ke efektiva kunlaboro inter niaj organizaĵoj pri difnita projekto principe eblas, kaj diskutis dum la paŭzoj kun pluraj partoprenantoj, interalie reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, al kiuj Renée Triolle disdonis ekzemplerojn de nia Manifesto de Prago.

François Lo Jacomo (Francio)



Ĝenerala sekretario Michela Lipari (meze) kaj komitatano Renato Corsetti (dekstre) estis la reprezentantoj de UEA en kunveno (19-21 sep., Romo) de 300 neregistaraj organizaĵoj prepare al Monda Pintkonferenco pri Manĝaĵoj en novembro. Kvankam la temo de la kunveno, la rajto je manĝaĵo por ĉiu homo, ne donis eblon por enfokusigi lingvajn problemojn, la delegitoj profitis la okazon por kontakti plurajn asociojn kaj informi ilin pri UEA. (R. Corsetti)

Parlamenta donaco dank' al Esperanto

Parlamenta delegacio de Kroatio vizitis en oktobro la parlamenton de Ĉinio. Ĝi kunportis el Zagrebo donacon kiu ne ekzistus sen Esperanto.

La kroata romano *Ano de l'ringludo* de Dinko Šimunović aperis esperantlingve en 1926 kiel 19-a volumo de la serio "Internacia Mondliteraturo" ĉe Hirt & Sohn en Lepsiko, en traduko de Fran Janjić. Tiu eldono estis la unua kiu peris la kroatan literaturon al legantoj en Ĉinio, kiam SU Fangsi aperigis sian ĉinan tradukon de *Ano de l'ringludo*, faritan el Esperanto, ĉe Ŝanhaja Komerca Presejo en 1936.

La konata Zagreba librokolektanto Marinko Gjivoje akiris la ĉinan tradukon, helpe de Ĉina E-Ligo, en 1960, kaj deponis ĝin en la Nacia kaj Universitata Biblioteko. Tie la libron vidis la tiama estro de la biblioteka trezorejo, Dražen Budiša, kiu nun vicprezidas la kroatan parlamenton. Li lanĉis la ideon represi la verkon, akompanotan de letero de Ĉina E-Ligo al Gjivoje, kiu klarigas la ekeston de la libro (el-esperantis ĝin Spomenka Štimec). Restas al ni deziri pli da similaj kazoj, en kiuj nia historio rolu por nia nuno.

Spomenka Štimec (Kroatio)

Ĉu komisiito pri arabaj landoj?

Esperanto apenaŭ ekzistas en arabaj landoj. La situacio povus iom pliboniĝi se troviĝus volontulo por estri komisionon pri arabaj landoj, kiel faris ekz. Hans Bakker por landoj afrikaj.

Necesas kontakti la jam esperantigitajn homojn, teni la kontaktojn kun ili, motivigi ilin propagandi, kolekti la jam ekzistantan materialon ktp.

Kandidatoj klarigu kial ili interesiĝas kaj kion ili povos fari, al Renée Triolle (adreso en la kolofono).

Handikapuloj: dek jaroj da kunlaboro

En Prago la Komitato akceptis kvar novajn fakajn asociojn kunlaborantajn (sep., p. 145): unu el ili estas Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, aktiva organizaĵo kiu jam faris kelkajn konkretajn proponojn en sia kampo. Estrarano Amri Wandel ripetas sian inviton al aliaj fakaj asocioj: sendu al nia revuo prezenton de viaj organizaĵo, agado kaj celoj.

Fine de aŭgusto 1985 kunvenis en rekapabla medicinentro de Hrabyně (Ĉeĥio) 17 esperantistaj handikapuloj kaj fondis la Sekcion de Esperantistoj-Invalidoj kadre de Ĉeĥa E-Asocio. Dum la fondkunveno oni aprobis programcelojn kiuj validas ĝis hodiaŭ sen ia ŝanĝo, kvankam la iama sekcio transformiĝis en sendependan Asocion de Esperantistoj-Handikapuloj (en marto 1991), kies Internacia Klubo en septembro 1993 estis

aprobita kaj registrita kiel neregistara internacia organizo.

Kion ni atingis dum la pasintaj 11 jaroj? Niajn ĉiugradajn korespondajn E-kursojn finstudis 421 kursanoj. Hodiaŭ tiuj kursoj havas 17 lernantojn. Ni ekfunkciigis tri rondetojn en kiuj progresantoj komunikas pere de sonkasedoj. Partoprenas 12 enlandanoj kaj 5 eksterlandanoj. Ni efektivigis:

- la 1-an Mondkongreson de E-istoj-Handikapuloj en Františkovy Lázně (1992), dum kiu oni aprobis la Statuton de la Internacia Klubo;
- la 2-an Mondkongreson en Kladno (1994), kiam oni alvokis internaciajn nee-istajn organizaĵojn de handikapuloj al kunlaboro;
- sep internaciajn renkontiĝojn de esperantistaj handikapuloj: Hrabyně 1987, Hodonín u Kunštátu 1988, Olomouc 1989, Slaný 1990, Františkovy Lázně 1991 kaj 1993, Skokovy 1995;
- 19 regionajn seminariojn en naŭ urboj, plejparte en Prago.

Jam pli ol dek jarojn ni eldonadas regule ĉiumonate nian organon *Informilo*. Ĝi estas la unusola E-periodaĵo en nia respubliko kiu aperadas ĉiumonate, kaj la sola E-gazeto de esperantistaj handikapuloj. Tri jarojn aperadas kvaronjara almanako de *Informilo* kun la titolo *Antaŭen*.

Dum la internacia E-semajno en Františkovy Lázně ni inaŭguris, la 19-an de oktobro 1991, memortabulon sur la loko de iama Zamenhof-monumento, la unua en la mondo. Nia memortabulo estis, la 10-an de junio 1994, vandale detruita. Sed jam la 8-an de aprilo 1995 ni sukcesis re-inaŭguri la renovigitan memortabulon. La 17-an de junio 1995 ni metis ŝtonon kun memorskribo al la Esperanto-tilio de la kastela parko en Lázně (somera sidejo de la prezidento), plantita tie dum nia internacia renkontiĝo en Slaný (1990). En venonta julio [12-19, vd. "Kalendaro", p. 187] ni organizos nian trian mondkongreson.

Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj

Du neŭtralaj lingvoj

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) uzis en studsesio ankaŭ la latinan lingvon.

Dum la 17-a Sanmarina Universitata Studsesio (SUS, 2-6 sept.), kiu plejparte okazis en Rimini, unuafoje realiĝis kadre de AIS-konferenco latina simpozio. Latinisto prof. Vido Angelino emfazis ke Esperanto kaj latino ne konkurencas pri interkompreniĝo, sed suplementas unu la alian. La pacan kunekzistadon efektive pruvis la latinistaj kunsidoj, regule ĉeestataj de aro da esperantistoj ne-latinistaj, kiuj tamen sukcesis bone sekvi la prelegojn.

Kiel konate, post sukcesa kunlaboro de AIS en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Seulo kaj Tampere, en Prago unuafoje la kompleta studprogramo de AIS-konferenco estis integrita al la programo de UK. La kongresanoj povis sen aparta aliĝo partopreni la ses kursojn kaj la liberajn prelegojn de la 16-a SUS (21-30 jul.), kiuj okazis paralele al kaj ankaŭ iom post la UK. La plej nombran aŭskultantaron (ĉ. 60 homoj) havis la okhora kurso pri ludoteorio de la Nobel-premiita prof. d-ro Reinhard Selten.

Por 1997 AIS planas konferencojn en Bydgoszcz (Pollando), en Rimini/San-Marino (30 aŭg.-5 sep.), kaj dum la Universala Kongreso en Adelajdo.

Laŭ informoj de Reinhard Fössmeier



En la lasta semajno de septembro, dum sesio de Eŭropa Parlamento, la halo de la parlamentejo gastigis ekspozicion de neregistaraj organizaĵoj. Zorge de komisiito Hans Erasmus, UEA afiŝis (meze) pri la rolo kiun Esperanto povas ludi en lingva demokratio kaj faciligo de lingvolernado.

Kalendaro 1996-97

Ĉi-sube sekvas daŭrigo kaj kompletigo de la aranĝo-listo aperinta en jul.-aŭg. (p. 126). Informoj pri eventoj tie anoncitaj estas nur parte ripetataj. La venonta "Kalendaro", la plej kompleta, aperos en marto.

plurfoje

Mikaelo Ĉertilov, a/k 21, RU-143000 Odincovo-6, Moskovskoj obl.; ☎/☎+7/095/243-74-56; ✉era@glas.apc.org

Kroata E-ista Unuiĝo, Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ✉mbelosev@public.srce.hr

Derek Tatton, Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG Britio; ☎+44/1782/372-105; ☎372-393

Ferdi Vince, "Hejme", 13 rue Dr. Schweitzer, FR-44600 Saint Nazaire; ☎+33/40-70-46-74

novembro

09: Malferma Tago de la Centra Oficejo, Roterdamo (CO de UEA, adreso en la kolofono)

09-11: Semajnfina staĝo Esperanta kaj korusa, Saint-Brieuc, Francio (Esperanto-22, 6 rue J.P. Calloc'h, FR-2200 Saint-Brieuc; ☎/☎+33/96-94-08-54)

29-01: Jarfina Zamenhofa Festo, Chemnitz, Germanio (Frank Nitzsche, Am Karbel 66, DE-09116 Chemnitz; ☎+49/371/363-652; ☎488-53-99; temo: "E-o en scienco kaj tekniko")

decembro

06-08: Sankt-Nikolaas Festo-Renkontiĝo, Zakopane, Pollando (Esperanto-Regiona Societo, Sobotské nám. 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio; ☎/☎+42/92/32-419)

06-09: Rendevuo kun Sankta Nikolao, Beskidoj, Ĉeĥio (Blanka Gruntová, Vítězná 95, CZ-78401 Červenka)

14-21: Renkontiĝo de Bariloche E-Rondo, Bariloche, Argentino (CC 371, AR-8400 Bariloche; ☎+54/944/42-154)

26-31: Kvara Togolanda E-kongreso, Vogan (Unuiĝo Togolanda por Esperanto, B.P. 12096, Lomé; temo: "Utileco de Esperanto")

27-03: 13-a Internacia Festivalo por mezaguloj kaj junaj familioj, Würzburg, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Nidenstein; ☎+49/5624/8007; ☎5624/322)

27-03: 40-a Internacia Seminario de Germana E-Junularo, Freiburg i. Bregau (Marc Stessgen, Hagedornstr. 6a, DE-51069 Köln; ☎/☎+49/221/685-597; ✉a2899426@hpw1.rzr.uni-koeln.de; temo: "Regionoj — ĉu la veraj landoj?")

27-03: Skiferio, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds; ☎/☎+41/39/267-407)

28-01: E-grupo en la internacia junulara renkontiĝo de la Taizé-komunumo, Stutgarto, Germanio (Reinhard Pflüger, Hermannstr. 3, DE-60318 Frankfurt)

1997

januaro

24-26: "Ni festivalu!" kaj Seminario por instruantoj, Barlaston, Britio (Derek Tatton, adreso supre)

29-30: Pedagogia seminario kaj

31-02: Rusia E-ista Kongreso, Moskvo (Mikaelo Ĉertilov, adreso supre; temo: "Patroj kaj filoj en nuna Esperantujo")

februaro

03-05: Konferenco "Lingvo-etnaj problemoj sur la postsovetia spaco", Moskvo (Mikaelo Ĉertilov, adreso supre; aranĝo kun esperantista partopreno)

09-10: Plurnivela E-staĝo, Nantes, Francio (Ferdinand Vince, adreso supre)

22-23: Vintraj tagoj de E-Asocio de Finnlando, Seinäjoki (EAF, Pengerkatu 18 A 86, FI-00500 Helsinki; ☎+358/9/715-538; ✉tijupie@uta.fi)

marto

08-15: 38-a Internacia Fervojista E-ista Skisemajno, Mühlbach, Aŭstrio (Jan Niemann, Edvard Munchsvej 9, DK-3000 Helsingør, Danio)

28-31: Paska Renkontiĝo de Nederlanda E-Junularo, Breda (Marijke Peet, Laan van Nieuw Guinea 113, 3531 JG Utrecht; ☎+31/30/271-70-59; ✉m.f.peet@stud.let.ruu.nl; temo: "Antaŭjuĝoj")

28-04: 13-a Printempa Semajno Internacia kaj 3-a Printempa Lernejo Internacia, Duderstadt, Harc-Montaro, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ☎2641/978-666)

29-31: 52-a kongreso de SAT-Amikaro, Limoges, Francio (Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris; ☎+33/1/47-97-87-05; ☎47-97-71-90; ✉sat-esp@worldnet.net)

aprilo

24-27: A-seminario por Cseh-instruistoj, Triesto, Italio (Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste; ☎/☎+39/40/763-128; gvidas Katalin Smidélusz)

majo

02-04: 92-a Skota kaj 81-a Brita Kongreso de E-o, Perth, Skotlando (Tom Neil,

37 Soutar Crescent, Perth, PH1 1QB Britio; ☎+44/1738/623-699)

10-13: Esperanta Kultura Festivalo, Aalen, Germanio (Esperanto-Stuttgart, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart; ☎+49/711/860-15-20)

10-17: 49-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio, Košice, Slovakio (Magdalena Feičičová, Bernoláka 25/5, SK-01001 Žilina)

16-19: Tria Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, Stutgarto, Germanio (Esperanto-Stuttgart, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart; ☎+49/711/860-15-20)

17-18: Unua kongreso de kroataj esperantistoj, Zagrebo, Kroatio (Kroatia E-Ligo, Amruševa 5, HR-41000 Zagreb; ☎+385/1/481-01-52; temo: "Kroatio por Esperanto — Esperanto por Kroatio")

17-19: 14-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca E-Movado, Budapeŝto, Hungario (Movilo, Nyírpálota út 107, HU-1157 Budapest; ☎+36/1/271-95-10; ☎418-28-40)

17-19: Plurnivela E-staĝo, Préfaiilles, Francio (Ferdinand Vince, adreso supre)

23-27: Kongreso de Franca Katolika Asocio, La Houssaye-en-Brie, Francio (Frato R.-J. Marmou, Prieuré St. Martin, 149 rue Etienne Jodelle, FR-77610 La Houssaye-en-Brie)

24-31: Junulara renkontiĝo, Vladivostoko, Rusio (Vladivostoka E-klubo, OIAK, str. Svetlanskaja 50, RU-690600 Vladivostok; ☎+7/4232/220-715; ☎268-004; ✉espero@pub.marine.su)

30-01: 5-a Internacia Kultura Semajnfino, Antverpeno, Belgio (Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; ☎+32/3/234-34-00; ☎234-54-33; ✉fel@knooppunt.be)

junio

05-08: 9-a Alp-Adria Konferenco, Kroatio (Kroata E-ista Unuiĝo, adreso supre; temo: "Natura — nia vivtrezorejo")

12-15: 17-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj, Toruń, Pollando (Muzeum Etnograficzne, Waly Gen. Sikorskiego 19, PL-87-100 Toruń; kun uzo de E-o kiel pontlingvo)

23-11 julio: 28-a Somera Kursaro, San-Francisko, Usono (Catherine L. Schulze, 410 Darrell Rd., CA 94010-6710 Hillsborough; ☎+1/415/342-17-96)

26-29: FREŜO '97, Olsztyn, Pollando (Andrzej Gielert, ul. Murzynowskiego 22/27, PL-10-684 Olsztyn; ☎+48/89/428-898)

27-11: Internacia E-Feriado, Bjalistoko, Pollando (Bjalistoka E-Societo, p.k. 67, PL-15-001 Białystok)

28-06 julio: Meznorvega Jubilea Renkontiĝo, Trondheim, Norvegio (Ulf Stenhaus, Arne Solbergsv. 32, NO-7075 Tiller; ✉http://www.kvatro.no/~ulf/Eo/esp/MJR.html)

julio

05-12: 63-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj, Kievo, Ukrainio (Ludmila Galickaja, Sverdlova 186/III, UA-286018 Vinnica)

- 08-13: 7-a Internacia Kongreso de Monda Turismo, Valencio, Hispanio (Augusto Casquero de la Cruz, Avenida Burjasot 29, A-31, ES-46009 Valencia; a-casquero@redestb.es)
- 12-15: 45-a Kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, apud San-Francisko, Usono (ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530; [+15106530998](tel:+15106530998); [+16531468](tel:+16531468); elna@netcom.com)
- 12-17: 33-a Brazilia Kongreso de E-o (Brazilia E-Ligo, C.P. 3625, BR-70084-970 Brasília - DF; [+55612261296](tel:+55612261296); bel@brnet.com.br; temo: "Rilatoj inter sciencoj kaj artoj") kaj 18-a Brazilia E-ista Junular-kongreso, Curitiba (Brazilia E-ista Junulara Organizo, C.P. 1097, BR-13001-970 Campinas - SP; [+55192522460](tel:+55192522460); [+55192434588](tel:+55192434588); kultura@ccvax.unicamp.br)
- 12-18: Internacia E-Konferenco, Rafina apud Ateno, Grekio (Eric Laubacher, OSIEK, 1 rue des Vosges, FR-78180 Montigny-le Bretonneux; Eric.Laubacher@mail.dotcom.fr; temo: "Helenaj influoj en la mondkulturo")
- 12-19: 3-a Mondkongreso de E-istoj-Handikapuloj, Pardubice, Ĉeĥio (Josef Vaněček, Na okrouhliku 21, CZ-53003 Pardubice)

19-26: 82-a Universala Kongreso de Esperanto, Adelajdo, Aŭstralio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo")



**53-a Internacia Junulara Kongreso,
24-31 aŭgusto 1997, Assisi, Italio**

- 19-27: 33-aj Baltiaj E-Tagoj, Haapsalu, Estonio (E-Asocio de Estonio, Rakkoja pl. 14, EE-0001 Tallinn; [+3722682807](tel:+3722682807); [+3726311157](tel:+3726311157))
- 27-02: 31-a ILEI-Konferenco, apud Melbourne, Aŭstralio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; temo: "Multkultureco kaj lingvolernado")

aŭgusto

- 01-07: FESTO, internacia junulara renkontiĝo, Grésillon, Francio (Junulara E-ista Franca Organizo, 4 bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris)
- 01-08: Internacia Metodika Seminario, apud Budapeŝto, Hungario (Kroata E-ista Unuiĝo, adreso supre)
- 01-09: 70-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Aŭgsburgo, Germanio (Hermann Schmid, Waterloostr. 21, DE-86165 Augsburg; [+49821792835](tel:+49821792835); [+49713074](tel:+49713074))
- 09-17: Eŭropo-Azio '97, Jekaterinburgo, Rusio (Organiza komitato, RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67; [+73432224501](tel:+73432224501); [+7518647](tel:+7518647) (Esperanto 224501); vak@sbank.e-burg.su; temo: "Nia mondo en la tria jarmilo")
- 23-29: 66-a Itala Kongreso de E-o, Napolo (Grupo "Harmonio kaj Progreso", Via Santa Brigida 64, c/o UUCI, IT-80132 Napoli; [+39817130806](tel:+39817130806); [+395510874](tel:+395510874))
- 24-31: 53-a Internacia Junulara Kongreso, Assisi, Italio (Itala E-ista Junularo, via Villorosi 38, IT-20143 Milano; [+39258100857](tel:+39258100857); f.amerio@agora.stm.it kaj <http://www.silab.dsi.unimi.it/~gc412712/ijk.html>; temo: "La homo: ĉu super aŭ parto de la naturo?")

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1997

La Belartaj Konkursoj de UEA denove invitas partoprenantojn por sep branĉoj. La rezultojn oni anoncos kadre de la Universala Kongreso en Adelajdo. Same kiel la UK mem, ankaŭ la Belartaj Konkursoj konkuros novan kontinenton kiel sian scenejon. La laŭreatojn atendas monpremioj, kiuj estas pli altaj ol antaŭe. Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 82-a UK: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn Song-san" kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistema VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1996. Unu premio.

Sendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1997. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1997. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj la adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 400 gld. Dua premio: 280 gld. Tria premio: 160 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita): 280 gld. Infanlibro de la Jaro: 840 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkupono ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Gufujo establiĝas, financo premas

La 52-a Internacia Junulara Kongreso (29-a de jul. – 5-a de aŭg.) gastigis preskaŭ 400 partoprenantojn el 36 landoj en la infan-kaj ripozcentro de Güntersberge, vilaĝo en la Harc-montaro, en la germana federacia lando Saksio-Anhalto. Jen tri raportoj kun malsamaj fokuso:

Necesos resekurigo

Inter la plej gravaj temoj kiujn traktis la TEJO-Komitato en Güntersberge estis la rolo kaj financado de BonEJO (la TEJO-oficejo en Bonn; vd. jun., p. 112) kaj la financa situacio de TEJO ĝenerale. Oni konstatis ke BonEJO povos tre utili en pluraj kampoj, speciale en la akirado de subvencioj kaj en la kunordigo de eŭropa agado.

La granda defcito de TEJO en 1995 kompreneble instigis diskutojn pri plibonigo de la financa situacio. En laborrondo oni pli funde diskutis pri la ebloj ricevi pliajn subvenciojn, ĉefe por subteni la jam ekzistantajn aktivadojn. Pro nia kreskanta kono de la eŭropaj strukturoj, aperas pli kaj pli da vojoj por TEJO al subvenci-fontoj, sed necesas pli da peno kaj forto por efektive atingi ilin. Grava konkludo por landaj kaj lokaj aktivuloj estas ke pere de TEJO ankaŭ ili povas uzi tiujn vojojn, se ili havas bone prezenteblan projekton (tema renkontiĝo, kultura evento, interŝanĝa kontrakto ktp).

Akceptiĝis ekvilibra buĝeto por 1997, kun aldona rimarko ke necesos, eble malrapide, forviŝi la grandan financon perdon de 1995. Estos grava tasko dum la venontaj jaroj: resekurigi la situacion de TEJO!

Elektiĝis kvin novaj komitatanoj C, kaj estis akceptita nova Landa Sekcio: Portugala Esperanto-Junularo. Oni eksigis la landan sektion Jugoslavio E-ista Junulara Asocio, pro nefunkcio kaj superfluo, kaj ricevis informon ke la organizo Junaj Esperantistoj en Slovakio ne plu ekzistas. TEJO nun havas do 37 landajn (kaj 2 fakajn) sekciojn.

Danny ten Haaf
Prezidanto de TEJO

Glueca reklamo

La Internacia Vespero estas ofte relative reprezenta pri tuta Esperanto-semajno. Tiu vespero dum la IJK '96 estis iometege embarasa! Jes ja. Mankis ne kontribuoj — sed prudento! La vespero iĝaĉis glueca reklam-programo por Esperanto-artikloj kaj -aranĝoj: Arnau skeĉe varbis por siaj du nove aperintaj bildstri-volumoj, Danny kaj Saskia reklamis la ĵus aperintan K-diskon *Muzikpluvo* de




Foto: Jukka Pietiläinen

la grupo Akordo, poste la novan *Pasporta Servo*, kaj Saskia reaperis kiel rakontanta sorĉistino por atentigi pri okazonta TEJO/KER-seminario. ... Dawid propagandis la ne tiom freneze bone vendatan kongresan T-ĉemizon, kun surskribaĵo "Formoj de kunvivado" (hej, legantoj, jen la kongres-temo, sed la prelegojn pri ĝi oni povis nombri per unu mano). La hungaroj almenaŭ spritis sciigante pri la baldaŭa Internacia Junulara Seminario.

Kaj nun laŭdo por tiuj kiuj ne reklamis: la muzikgrupoj JoMo & la Mamutoj kaj Persone, kiuj montris dum la semajno sian povon necesigi orelŝtopilojn pro laŭtegaj amplifiloj. Cetere: ankaŭ Kajto ludis. Punkto.

Menciigu la tutsemajna, riĉa libro-servo, la trifoja teatra vespero, la etosplena germana vespero folkloro, ekskursoj i.a. al la belega urbo Quedlinburg, la "gufujo" senfuma, nokte kandle lumigita, kun 23 specoj de teo, infuzaĵoj kaj tizanoj, kies noktomeza literatura horo trovis multajn ŝatantojn: ĉiam laŭtleĝado de originala Esperanta literaturo, de A kiel Auld ĝis Z kiel Ludoviĉo. Gufujo ŝajnas iĝi nova institucio dum Esperanto-aranĝoj. Kompreneble dir-eblus, -endus kaj -indus multe pli pri la kongres'... Konsultu alian gazeton.

Laŭ raporto de Rolfo (Eŭropo)

Oni sukcesis konstrui la ponton

Propraj spertoj instruas pli ol prelegoj kaj legado: jen la plej forta impresio de la laborrondo pri interkultura kompreniĝo kiu okazis en la ĉi-jara IJK.

La partoprenantoj diskutis ankaŭ pri diskriminacio, laŭ propraj spertoj. Ili prezentis la situacion de iu diskriminaciata grupo, kaj rakontis i.a. kio ne plaĉas al ili en la propra grupo: la propraj stranguloj. Nur la grupo de maldekstramanuloj ne havis tiajn strangulojn, eble ĉar al ili mankas distinge propra kulturo. Montriĝis ankaŭ ke esperantistoj ne ŝatas juĝi homojn laŭ nacieco, almenaŭ ne publike. Kiam oni devis elekti en ludo kiu el ok personoj saviĝu, oni argu-

mentis per aĝo kaj profesio, sen aludo al nacieco.

Eble la plej atentinda parto estis rol-ludo en kiu grupo de fremdaj specialistoj venis konstrui ponton por indiĝena vilaĝo, kun kulturo tre mal-simila al la ilia. Tamen, malgraŭ komunikaj problemoj kaj malagrablaj sentoj ambaŭflanke, la du grupoj sukcesis konstrui la ponton.

Ofte interkultura komunikado estas instruata en rondoj kiuj konsistas plejparte el samnacionoj. En Esperantaj renkontiĝoj la grupo estas tre internacia, kaj la naciaj kulturoj de partoprenantoj donas al la ekzercado apartan spicon.

Jukka Pietiläinen (Finnlando)

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 12



Du artikoloj de Influo-kunlaborantoj spronis respondojn, pri kio mi ĝojas. Samtempe

daŭre enfluas informoj, pli kaj pli ofte senditaj rekte al mi (malgraŭ miaj malhelpaj adres-ŝanĝoj!). Kiel kutime, la plimulto koncernas la aperon de Esperanto en televido aŭ ĵurnaloj. Tiaj novaĵoj estas ĉiam bonvenaj, kaj ni eĉ ne povas raporti pri ĉiu el ili. Sed mi esperas ke enfluos informoj ankaŭ pri tio kiel oni kaptas la atenton de ĵurnalistoj por okazigi tian publikecon; unu celo de ĉi tiuj paĝoj estas proponi utilajn konsilojn ĝuste pri aliro al amas-komunikiloj. Tial informoj kaj pri sukcesoj kaj pri malsukcesoj utilas.

Geoffrey Greatrex

politiko

Eŭropa Unio

Dank' al la agado de Germain Pirlot kaj aliaj, altiĝas la nombro de eŭro-parlamentanoj kiuj "subtenas eventualan uzadon de Esperanto por helpi al solvado de la lingva problemaro en Eŭropa Unio"; la grupo enhavis la 20-an de sept. 84 el la 626 deputitoj (13,4%), plej multajn el Britio (19), Italio (18) kaj Belgio (15). Plej fortas la

Ĉu Esperanto Hodiaŭ?

La propono de Ian Fantom en la lasta numero de "Influo" pri *Esperanto Hodiaŭ* ŝajnas al mi tre interesa. Laŭ mi ĝia redaktejo devus esti la CO de UEA, ĉar nur tie oni havas la aktualajn informojn kaj la grafikajn kapablojn por fari indan eldonaĵon. Cetere, UEA povus pli rekte persvadi la landajn asociojn subteni la projekton. Verŝajne oni ne povus postuli ke abono al *Esperanto Hodiaŭ* estu deviga por ĉiuj landaj asocioj, ĉar tiam oni devus multe grandigi la kotizon pagatan de la LA-oj al UEA. Do verŝajne la unua paŝo estu ke UEA produktu provnumeron kaj dissendu ĝin al la landaj asocioj kun detaloj pri la kosto kaj kun peto aliĝi. Kun eldonkvanto de 30 000 la kosto estus relative malalta, do mi supozas ke la plej multaj LA-oj bonvenigus ĝin kiel suplementon al siaj landaj revuoj.

Mi povas antaŭvidi du problemojn, pri kiuj indas atenti: unue, multaj landaj asocioj ne kapablas rapide reagi pri aferoj kiuj rilatas al la buĝeto. Do oni nepre lasu multe da tempo inter la dissendo de la provnumero kun la detala propono kaj la proponita lanĉodato. Se ne, oni verŝajne trovos ke multaj LA-oj ankoraŭ ne povis definitive respondi antaŭ la limdato. Due, oni devus antaŭe interkonsenti pri la aperodato de *Esperanto Hodiaŭ* kaj aperigi ĝin ĉiam tre akurate, ĉar LA-oj volus dissendi ĝin kun siaj landaj revuoj, kaj ili ofte ne povas prokrasti la aperon de siaj landaj revuoj pro la enestantaj informoj pri tuj okazontaj aranĝoj, kaj anoncoj pri jarkunsidoj kaj simile devas eĉ laŭleĝe aperi je la ĝusta tempo. Se UEA ne sukcesus aperigi la novan eldonaĵon akurate, certe estus grandegaj plendoj kaj postuloj pri malabono ktp.

Verŝajne *Esperanto Hodiaŭ* aperu nur 6-foje jare, ĉar tio estas la plej ofta ritmo de la landaj revuoj kun kiuj oni dissendus ĝin. Pri la precizaj datoj oni devus demandi al la LA-oj. (E-Asocio de Britio kutimas dissendi sian revuon je la komenco de ĉiu nepara monato, ekzemple.)

Edmund Grimley Evans

Mi preskaŭ samopinias kun I. Fantom, sed ŝatus ion aldoni: oni povus imagi ke ĉiu landa asocio posedu unu respondeculon kun difinita buĝeto, kiu altelefonu la diversajn aktivulojn por pluki informojn pri okazintaĵoj aŭ okazontaĵoj, kaj redaktu tiujn koncize en Esperanto kaj en sia nacia lingvo. La kontakto estu pertelefona, eĉ plurfoja, por instigi pli facile al reago kaj akiri informojn de aktivuloj tro ofte ne rapide reagaj kaj neredakteblaj. La esperantlingvaj artikoloj iru al Pola Radio kaj al *Eventoj*: al Pola Radio, ĉar ĝi plej ofte kaj plej profesie informas, al *Eventoj* ĉar ĝi jam estas la plej ofte aperanta gazeto — kial krei novan? Dank' al tia sistema informado ĝi certe trovos multajn novajn abonantojn kaj baldaŭ povus iĝi pli belaspekta kaj malpli kosta. La nacilingvaj artikoloj iru al la nacilingvaj eldonaĵoj aŭ informpaĝoj de la landaj asocioj. Tiel eblus speguli la internaciajn, naciajn, regionajn kaj lokajn okazaĵojn priesperantajn. Pli detalaj raportoj aperus en la kutimaj Esperanto-gazetoj naciaj kaj internaciaj, ĝeneraltemaj aŭ fakaj.

Edmond Ludwig, TAKE

subteno ĉe parlamentanoj irlandaj (13 el 15) kaj belgaj (15 el 25). S-ro Pirlot (Steenbakkersstraat 21, BE-8400 Oostende,

Belgio) pretigis tutan dosieron por tiuj kiuj volas lobi ĉe siaj parlamentanoj, kaj bonvenigas kunlaborantojn.

Redaktoro: Geoffrey Greatrex, The Highlands, Great Doward, Symonds Yat, Herefordshire, Britio HR9 6DY;  srsbg@thor.cf.ac.uk **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;  +31 10 436 1044;  +31 10 436 1751;  uea@inter.nl.net

Nederlando

Kiam la E-grupo en Den Helder aktivigas en foiro aŭ dum urba festo, oni disdonas teston kun dek demandoj: Ĉu vi ŝatas renkonti eksterlandajn amikojn? Ĉu vi volas paroli kun ili sen problemoj? Ĉu facila fremda lingvo povas esti utila al vi? ktp. Se aperas ses aŭ sep jeso, tiam utilas serĉi kontakton kun la loka E-klubo. Ekzempleron de la (nederlandlingva) testo vi povas ricevi ĉe la redakcio de *Fen-X*: Hans Bakker, Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam.

Brazilo

BEJO, Brazilia E-ista Junulara Organizo, lanĉis sian "Rebato-Servon", kiu klopodos interligi en Brazilo rebatemulojn kun aŭ sen retadreso. La interesitaj aliĝintoj al la Servo perpoŝte ricevos de ni en cirkulero la detalojn pri rebatota artikolo. (Inter kiuj ajn urboj en Brazilo, letero ĝenerale bezonas unu aŭ du, eventuale tri tagojn). La cirkuleroj produktiĝos tuj post la informiĝo. Ni peros al niaj rebatantoj ankaŭ la alvokojn el la internacia listo "rebato-I". La "n-ro 0" de la RS-cirkuleroj, aperinta la 24-an de aŭgusto startas jam per unu el tiuj tipaj sencelaj atakoj al Esperanto (artikolo en la revuo *Exame* pri aĉetado per TTT, kiu aludas "tiun frenezan lingvon Esperanto"). La Servo petas ke reagantoj kun retadreso sendu al ni kopion de siaj mesaĝoj, por ke ni sekvu la sintenon de la eldonistoj.

Rebato-Servo: a/c J. R. Piton, Av. João B. M. do Canto 257/J2, 13031-210 – Campinas (SP); ☎ 019/232-12-12; ✉ kultura@turing.unicamp.br aŭ dosantos@correionet.com.br. (BEJO-estraro)

Bosnio kaj Hercegovino

En Banja Luka, Respubliko Serba, inter la 17-a kaj 22-a de septembro okazis la unua internacia librofoiro organizita de la gazetara entrepreno Glas Srpski ("Voĉo Serba"). Ekspoziciis ankaŭ Esperanto-Ligo de Respubliko Serba kaj la E-societo La Mondo el Banja Luka. La vizitantoj povis vidi kelkajn Esperantajn librojn de verkistoj el eks-Jugoslavio kaj el la tuta mondo. La foiro estis tre vizitata, kaj multe da homoj interesiĝis pri Esperanto kaj Esperanta literaturo. Kelkaj el ili aĉetis lernolibrojn kaj anoncis sian partoprenon en la sekva Esperanto-kurso de la urba societo, kies Fondado Petar Kočić anoncis ke baldaŭ aperos la rakonto *Mrguda* de Petar Kočić, kiun tradukis Boriša Miličević, direktoro de la Esperanto-Instituto el Beograd. (M. Vrhovac)

Francio

Ekde 1993 Esperanta Kultur-Centro kunaranĝas la lingvofeston "Printempo de la lingvoj" en Toulouse. Ĉi-jare, la 5-an de majo, ekspozicia budo kaj prelego de István Ertl pri la neŭtraleco kaj kultura rolo de E-o altiris relative multe da interesatoj en tre malbona vetero. (J. M. Cash, I. Ertl)

Problemo pri sinidentigo kaj sinkompreno en nia movado ĉiam alvokas atenton: la ĵus aperinta artikolo de Ziko Sikosek "For la Esperantan sektismon!" (jul.-aŭg., p. 136) atestas pri tio. En la artikolo temas pri kelkaj trajtoj de la E-movado ne plaĉaj al la aŭtoro, tamen ne sektismaj en la ĝusta senco. Estas vero ke la E-movado sekvas nekutiman kaj ne ĝenerale akceptitan doktrinon, proponante Esperanton kiel la helplingvon por internacia komunikado. Tio estas la esenco de la movado, sed ne kaŭzo rilatigi ĝin al sektismo. Sikosek erare asocias kun Esperanto celojn laŭ kiuj esperantistoj kvazaŭ kontraŭas lernadon de aliaj lingvoj, celas forigi ilin kaj *devigi* ĉiujn lerni Esperanton kiel la duan lingvon, per tio provokante protestojn. Li mencias ankaŭ neobjektivecon, malproksimecon de la fina celo malgraŭ la centjara penado, kaj eĉ misiismon en nia agado — kiel ili prezentiĝas en la Tradicia Esperanta Ideologio.

Mi jam skribis (okt. '94, p. 168) ke la esperantismo ne estas esence sekteca, ĉar ĝia praktika celo — pli perfekta internacia komunikado — estas ne religia kredo aŭ idealisma doktrino, sed inĝeniera ideo. Tamen, iom da idealismo en Esperanto nepre necesas por nia estonteco.

Multas fuŝaj solvoj

Elreviĝo pro la malproksimeco de la fina venko baziĝas sur la naŭva kredo ke ajna bona kaj utila ideo estas fine plene akceptata de la mondo. Envere, Esperanto estas nur unu el amaso da ideoj kiuj celas plibonigi ion en nia vivo. En tiu



"Ni ofte ironias pri 'strangeco' de nia esperantista popolo..."

Stari en vico

La fina venko de Esperanto vere ne proksimas, sed ne pro tio ke la celo estas erara aŭ la vojoj tute malbonaj. Simple ni "staras en vico", kaj klopodi eble necesos longe. Ĉe tiaj cirkonstancoj la specifaĵo de Esperanto, nome ĝiaj Interna Ideo kaj kultura medio, esence distingas ĝin de aliaj inĝenierajoj, helpante konservi la Esperanto-komunumon kaj nutri ĝin tiom longe kiom necesos. Esperanto prezentas ankaŭ kulturen fenomenon, kaj almenaŭ pro tio ĝi restos nedisigebla parto de la ĝenerala homa kulturo. Tamen ni devas ne nur pasive atendi, eĉ ne nur sekvi la tradiciajn agad-direktojn por disvastigi Esperanton. Ni devas esplori ĉiujn ŝanĝojn en la rapidege evoluanta mondo kaj strebi al profesia solvo de la komplikega problemoj kiel "enmerkatiĝi nian produkton".

Moderna mondo: kiuj perspektivoj?

La strebo kreskigi po iom la nombron de la uzantoj de nia lingvo ne multe povas sukcesi, se konsideri la proporcion de proks. 1 miliono da Esperanto-parolantoj kontraŭ 5000-miliona homaro. Tamen, iam povos aperi novaj situacioj potencie favoraj al Esperanto, malgraŭ ke inter kelkaj plej gravaj faktoroj de la moderna historio troviĝas nenio kio povus speciale antaŭenigi Esperanton.

UN, Eŭropa Unio. Ili estas internaciaj forumoj senprecedencaj laŭ skalo, kun ĉiamaj lingvaj problemoj. Gravus ke en ambaŭ la plimulto de la landoj-membroj

parolas “malgrandajn” lingvojn. Tiu ĉi plimulto povus ja subteni la ideon de iu neŭtrala labor-lingvo, se... Se ekzistus praktika vojo por atingi tiun solvon. Estus ekstreme naive supozi ke altranguloj aŭ oficistoj iel mirakle ekposedos Esperanton, des pli ĉar ĝi ne povus plifaciligi ion tuj dekomence. Ni ne scias kiel eblus eviti la haŭson kaj ekstrajn elspezojn de la transira periodo. (Ni ofte ironias pri “strangeco” de nia esperantista popolo. Neniam ni forgesu ke nia distinga “strangeco” konsistas ankaŭ en tio ke ĉiu el ni siatempe, pro nura scivolemo, dediĉis kelkajn monatojn aŭ pli al senpaga streĉa laboro: lerni la fremdan lingvon Esperanto. Dume ĉe “nestranguloj” eĉ la simpla transiro al metra sistemo elvokas protestojn pro minaco de ĥaoso.)

Perkomputila tradukado. La ĉefa problemo ĉi tie estas la drasta diferenco inter la atendoj de uzantoj de traduk-sistemo kaj tio kion ĝi povas fari envere. Ili volas tute aŭtomatan tradukadon de ajna teksto en ilia fako, kiu funkcii same rutine kiel fotokopiado. Tio tamen maleblas, ne pro nesufiĉa potenco de la nuntempaj komputiloj, sed ĉar difini tian taskon por programisto estas nerealisme. Eblas nur traduk-asistaj sistemoj, sed por tiaj nek la nombro de konsumantoj grandas, nek Esperanto povas doni iujn specialajn gravajn avantaĝojn en la rolo de pontolingvo interna, nevidebla por uzantoj. (Iom da avantaĝoj ĝi donas, kaj la DLT-projekto baziĝis sur tio.)

Tut-Tera Teksaĵo kaj elektronikaj ret-sistemoj. Jen fenomeno kiu draste aktualigas internacian komunikadon kaj faciligas senpagan reklamadon. Ĝuste tio donas iom da novaj ŝancoj. Nun simpla serĉo laŭ la ŝlosil-vorto “Esperanto” rezultigas nombron jam impresan: troviĝas 10 426 dokumentoj kun tiu ĉi vorto en la reto! Eĉ pli gravas ke dank’ al la hiper-teksta strukturo ne-esperantistoj interesiĝantaj pri helplingvoj, internacia komprenemo, toleremo, frateco (Interna Ideo!) ks. havos ŝancon ekscii pri Esperanto — eble unuafoje en sia vivo. (Ni tamen ne atendu ke momenta scivolo de ajna ret-vaganto elkreskos ĝis multmonata pena lernado.)

La plurlingveco donas laboron al tradukistoj ankaŭ en la reto. Ekzemple la granda ret-provizanto Compuserve proponas tujan tradukon de tekstoj el la angla al la franca, germana, hispana, kaj el tiuj al la angla. Neperfekta aŭtomata traduko (kun neeviteblaj misoj) kostas 0,01 dolaron por vorto, dum traduko polurita de profesiaj lingvistoj kun plena respondeco — dekoble pli. Ni demandu nin: ĉu uzado de Esperanto kiel pontolingvo povus konkurenci kun tiatipa servo? Ĉu esperantistoj povus kreskigi kaj prosperigi ĉi tian komercon? Ne ŝajnas versimile.

Do, almenaŭ la ĵus traktitaj gravaj fenomenoj de la moderna vivo ne promesas novajn perspektivojn por atingi nian celon.


Sed se ni sekvos kaj atentos ĉiujn ŝanĝojn en la mondo, ni eble ne preterlasos la ŝancon vere favoran.

Pluekzisto — kun ĝuo

Kompare kun la epoko de la pioniroj, nun ni pli klare konscias ke registaroj kaj internaciaj instancoj frontas longan vicon da solvendaj problemoj — kun ĉiam limigitaj financaj rimedoj. La demokratia decidado por difini la prioritatojn en financado povas celi nur plej simplajn problemojn kun plej proksimaj celoj. (Studoj pri socia konduto evidencigas la iom paradoksan fakton ke individuo povas esti pli “saĝa” — pli fleksebla, decidpova kaj klarvida — ol kolektivo, lando aŭ eĉ la tuta mondo: tiuj estas tro inertecaj, blinde strebantaj nur al tuja profito kaj celoj plej proksimaj.)

Ni ne povas scii kiel distribuiĝos la prioritatoj de solvendaj taskoj en la estonteco de la homaro. Kiaj ajn ili estu, la demokratia ordo garantias nur tion ke ni ekzistas, plu ekzistos kaj plu sekvos niajn celojn — kun ĝuo!

Aleksandro Gofen (Rusio/Usono)



Manifesto de Prago

En Grekio la Manifeston de Prago publikigis la plej grava dimanĉa ĵurnalo, radio kaj televido (M. Pontika). Ĝi nun estas aperinta ankaŭ en la islanda kaj hungara. En Islando la plej granda nacia ĵurnalo *Morgunblaðið* aperigis (14 aŭg.) islandan tradukon kiu spronis aliajn komunikilojn raporti pri Esperanto; inter ili estis la ĵurnalo *Tíminn* kaj radiostacio. (B. Ragnarsson)

Ruĝa Kruco: Revuo

En la lasta numero (majo-junio) de la oficiala bulteno de Internacia Ruĝa Kruco — aperanta en la lingvoj franca, angla, hispana, araba kaj rusa — publikigis artikolo de UEA-membro José María Rodríguez Hernández, studento pri internacia juro, pri “La humanisma agado de la Esperanto-movado en la du mond-militoj kaj ĝiaj rilatoj kun Internacia Ruĝa Kruco”.

Internacie: Gazetoj

En sia julia-aŭgusta numero la “eŭropa magazino” *Business Life* de la brita flugkompanio *British Airways* donis po tri paralelajn paĝojn al du kontrastaj vidpunktoj pri Esperanto. Kep Enderby (i.a. LKK-estro de la venonta UK en Adelajdo) emfazis ĝian taŭgecon kiel “latino de la popolo”, dum Michael Jenner opiniis ke Esperanto “havis ian allogon en 1887”, sed ke ĝia “celita rolo kiel mondlingvo estas klare superflua, ĉar tiu bezono estas nun plenumata de la angla.” La aŭgusta *Wired*, monata revuo pri komunikado kaj komputiloj, simplige resumas sur sep paĝoj la historion de artefaritaj lingvoj. Malgraŭ rimarkoj ironiaj, aŭtoro Gavin Edwards opinias ke “se iam ekzistos vere internacia lingvo vulgara, ĝi verŝajne devos ➔

rimedoj/materialoj

Hispanio

Prove ekaperis la hispanlingva informcela bulteno *El Correo Español*, private redaktita de Juan Antonio Cabezas. (*Boletín*)

Brazilo

Brazila E-Ligo ĵus aperigis novan faldfoliojn pri E-o “Quem sabe Esperanto vive o mundo” (“Kiu scias E-on, ĝuas la mondon”, ĉi-apude). Ĝi estas duflanka kaj bildoplana, kun mallongaj klarigoj pri diversaj aspektoj de la lingvo. BEL pretas presi ĝin en aliaj lingvoj: kontaktu BEL, C.P. 03625, BR-70084-970 Brasília — DF, Brazilo.

“Kion fari?” folioj

S-ro G. Pirlot (adreso ĉe “Politiko”, p. 189) aperigis por aktivuloj serion da folioj kiuj proponas konsilojn pri pluraj temoj, ekz. “Kion fari por informi la gazetaron?”, “Kion fari por rebati en la gazetaro?”, “Kion fari por vigligi kluban vivon?”.

➤ esti lingvo artefarita. Kaj kvankam Esperanto ŝajnas dekadenci, ĝi ankoraŭ staras kiel la konkretiĝo de tiu eblo.”

Germanio: Gazeto

La peresperanta konatiĝo kaj geedzeco de la 28-jara francino Myriam Dacheux kaj la 33-jara germano Claus Günkel (fakdelegito en Viersen) interesis sufiĉe la ĵurnalon *Rheinische Post* por publikigi tutpaĝan raporton, kun foto, pri ilia familia vivo kaj pri E-o (6 sept.).

Nederlando: Televido, gazeto

En la populara televid-kanalo *Veronica* la 4-an de oktobro okazis dudek-minuta babilado kun Hans Erasmus kaj Wim Jansen. Programestro-poeto Jules Deelder, konata pro sia kutime sarkasma stilo, pri-demandis ilin kun videbla intereso. Mallonge aperis ankaŭ CO-oficisto Nikola Rašić, CO-volontulo Yu Tao, kaj pakistana UEA-membro Mian Salam Shany.

En la tre legata ĵurnalo *Algemeen Dagblad* du tre grandaj artikoloj, okulfrape ilustritaj, traktis pozitive E-on: en aŭgusto oni raportis pri la plano de interlingvistika katedro ĉe la Amsterdama Universitato, kaj sur oktobra opini-paĝo psikologo Ewald Vervaeke pledis por Esperanto kiel komuna eŭropa lingvo.

Ĉeĥio: Gazeto

Oni dediĉis du paĝojn al raporto pri la UK en Prago en la anglalingva semajna gazeto *The Prague Post* (28 aŭg.-3 sept.).

Irlando: Televido

Teamo de nova irlandlingva televida kanalo intervjuis komence de julio d-ron Sean Ó Riain, unuan sekretario de la ambasadejo de Irlando en Varsovio, ĉe la tombo de Zamenhof. Oni aludis la grandan malŝparon de mono ĉe EU pro tradukokostoj.

Portugalo: Konferenco

En majo okazis kongreso en Lisbono pri amasinformato. La magazino disdonita al la kongresanoj enhavis intervjuon kun la vicprezidanto de Portugala Esperanto-Asocio. Notindas ke la organizantoj decidis kontakti la asocion proprainiciate. (A. Martins)

Germanio: Revuo

En la aŭgusta *Deutsche Universitätszeitung*, renoma revuo kun pli ol 15 000 legantoj kaj abonata de ĉiu universitata biblioteko en Germanio, dupaĝa artikolo de Reinhard Fössmeier prezentis Akademion Internacian de la Sciencoj. La teksto aperis en la serio “Inter-Retoj”, en kiu ĉiufoje ano de prestiĝa asocio (kiel ekz. Internacia Asocio de Universitatoj, jam en kontakto kun AIS) prezentas sian organizaĵon. Reage jam alvenis modesta nombro da informpetoj. Posta numero de *DU* raportis pri la aneco de Gorbaĉov en AIS (vd. p. 198). (R. Fössmeier)

For la amatorecon!

En la artikolo “For la Esperantan sektismon!” de Ziko M. Sikosek estas listigita multego da disputitaj temoj de Esperantio, tiom multegaj ke se la legantoj reagus ekzemple nur al la kvin subpunktoj de la kvara ĉapitro, eĉ en tiu kazo estus bezonata unu plena numero de la revuo *Esperanto*.

Sikosek prave konstatas ke “ekzistas sektismaj trajtoj en Esperantio”. Inter multaj trajtoj ankaŭ mi spertis sektismon, sed mi taksas multe pli malbona trajto de Esperantio, pro ĝia disvastiĝinteco, la amatorecon. Jen kelkaj simptomoj de amatoreco en la artikolo de Sikosek:

- citado sen indiki la fontojn [*N.d.r.*: pro tio kulpas la redaktoro, ne la aŭtoro];
- uzado de terminoj kvazaŭ ili estus konataj aŭ estus vaste akceptitaj;
- komparo de du starpunktoj pri la rolo de Esperanto sen aludi pri kritikoj de aliaj verkantoj pri la sama temo, kaj sen kompari la ĉefajn paralelajn kaj malsimilajn opiniojn.

Respondi al Sikosek eblos nur tiam kiam li decidis kion li volas per Esperanto: Ĉu plibonigi la mondon? Ĉu konstrui internacian komunumon kun komuna lingvo? Ĉu konstrui komunumon kun la komuna, ĉefa lingvo Esperanto? Ĉu uzi Esperanton por faciligi la komunikadon inter diverslingvanoj — aŭ ion alian? Por atingi ĉiun el tiuj celoj necesas ja malsamaj rimedoj adekvataj.

Ankoraŭ unu ĝenerala rimarko. Spertante en la ĉiutaga vivo de uzantoj de Esperanto la multifacetecon de Esperantio, kiun montras diversaj studoj kaj artikoloj, estus inde provi trovi tiun minimumon pri kiu ĉiuj e-istoj konsentas, por ke la celo de la e-istoj estu prezentbla al neesperantistoj. Kaj se estas grupoj kun nenia komunaĵo, ni povu identigi nin kun la aliaj grupoj.

Oszkár Princz

Informado? Mi ne komprenas

En Prago mi unuafoje partoprenis UK-on kaj prelegis tie, en la kunveno “UEA pri informado”. La prelego enkondukis al la fako informado, sumigis miajn kritikojn kontraŭ ĝia nuntempa praktikado, kaj prezentis la planon eldoni manlibron pri diversaj branĉoj de informado. Pri mia prelego mi estis (escepte) tre kontenta — sed ne pri la publiko.

En la posta diskuto preskaŭ neniu aludis ion el la prelego — malgraŭ sufiĉa tempo kaj mia dufoja peto. Verŝajne 80% el la ĉeestantoj ja eĉ ne komprenis kion mi volis diri per “fuŝita bildo de Esperanto” aŭ “mitoj en Esperantio”.

Granda parto el la “diskutantoj” volis nur paroli pri sia aktivado. Temis sole pri “teknikaj” aferoj; mian proponon trakti enhavajn demandojn apenaŭ iu akceptis. La homoj nur havis postulojn kaj pli da postuloj (al UEA, al landaj asocioj ktp), sed neniu estis preta mem transpreni iun taskon.

Iu eĉ postulis de UEA instali komisiiton kiu kolektu rezoluciojn kaj manifestojn de Esperanto-kongresoj, traduk(ig)u ilin kaj sendu ilin al amaskomunikiloj. Mi rimarkigis ke tio estus grandega malŝparo de laborforto, ĉar neniu ĵurnalisto emas tralegi tiajn tedajn rezoluciojn, dum ĉiutage eldoniĝas multegaj rezolucioj pri multe pli gravaj aferoj. Jen, fine venis la atendita — eĉ laŭta — kontraŭdiro de kelkaj stranguloj. Bedaŭrinde, mi proponis ke oni prenu nur la esencajn rezoluciajn frazojn por gazetara komunikado: tio kontentigis kelkajn el la laŭtuloj. Unu tamen asertis ke la mallaboremaj ĵurnalistoj devas mem tralegi kaj koncizigi la rezoluciojn. Vi povas imagi ke tio ne altigis la nivelon de la diskuto.

Mi atentigis pri la danĝero ke la nuna jarcento fariĝos “la jarcento de Esperanto” — ĉar en la venonta jarcento ne plu ekzistos multaj Esperanto-lingvanoj. La kulpon pri tio, mi diris, havos la netaŭga informado. La ĉeestantoj laŭte vortkaj kapjesis, ne komprenante ke mi parolas pri ili.

Bonŝance mi havis similan prelegon poste en la Internacia Junulara Kongreso, kun multe pli kapabla publiko kaj fruktodona diskuto.


Ziko M. Sikosek

Vjetnamio: Gazetaro

La plej granda taggazeto de Vjetnamio, “*La popolo*”, informis pri la aliĝo de Vjetnama E-Asocio al UEA, kaj alian fojon pri la partopreno de VEA en la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo. Plejparto de la eseo

“Por pli alta valorigo de kulturo”, verkita de Dao Anh Ka pri la kongresa temo de la Praga UK kaj aperinta en la ĉi-jara *La Krom-KancerKliniko*, publikiĝis vjetname en la periodaĵo “*La Hanojano*”. (Dao Anh Ka)

Recenzoj



Riĉega regalo post jardekoj

Vocabolario italiano-esperanto. Carlo Minnaja. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1996. 1438p. 22cm. Antaŭparolo de Joshua Fishman. Bind. 120,00 gld.

La enkonduka ĉapitro de tiu ĉi 1400-paĝa vortarego, “Historio de vortaro”, estas fascina vojaĝo tra la tempo, kiu rekondukas nin al la jaro 1907, al prakajero kun iom pli ol 10 000 vortoj! Ĝia aŭtoro, Stefano La Colla, kun interrompoj daŭrigis sian leksikan laboregon ĝis mallonge antaŭ sia morto en 1966. Necesis, tamen, ankoraŭ 30 jaroj por ke Carlo Minnaja kun areto da helpantoj kaj stimulantoj kompletigu la titanan taskon. La listo de referencitaj verkoj (iuj aĵepintaj en 1995, aŭ konsulteblaj en Interreto), cetere, pruvigas la ĝisdatecon de la manuskripto ĝis la lasta tago antaŭ forsendo al presejo.

Antaŭ la vera leksika korpo de la libro, itallingva ĉapitro koncize, sed kadre de sia celo tre komplete, prezentas la Esperanto-gramatikon. Ĝia spegula ĉapitro E-lingva fideinde gvidas tra la itala gramatiko studentojn de ĉi lingvo kiuj tiucele uzas la vortaron.

Elstaras jena frazparto en la antaŭparolo de Joshua Fishman: “...dulingva vortaro devus ebligi al serioza studento esplori la demandon ĉu ekzistas kulture specifaj terminoj por kiuj mankas Esperantaj leksikaj ekvivalentoj...” Kiel belega okazo ricevi ĉi tian vortaregon recenzocelo ĝuste antaŭ la somera forveturo al Italio! Kia okazo elmeti ĝin senkompate al ĉiuj defioj de la itala manĝo-, trink- kaj plaĝokulturo... Ĉu troveblis trafaj

ekvivalentoj en la tutmonda Esperanto, ĉu bonintencaj ĉirkaŭparoloj, ĉu senesperigaj elturnaĵoj? Oni devus esti vera pedanto por trovi mankon aŭ seriozan mison en ĉi semantika kampo, kiun ni elektis kiel provgrundon por niaj esploroj! Ĉiuj tipe

italaj manĝaĵoj estas trafe tradukitaj, kvankam ni iom bedaŭras karbo-kopiojn kiel *risotto* ‘rizoto’ kaj *mortadella* ‘mortadelo’ (oni serĉu la signifojn en PIV). En la kazo de *gnocco*

Stefano La Colla (1889-1966) komencis la gigantan verkon en 1907...



kaj Carlo Minnaja ĝin finis en 1995!

almenaŭ estas du: la kopio ‘noko’ kaj ĝia priskriba versio ‘(pasto)buleto’. Ankaŭ en aliaj kampoj la vortaro profitus el iom pli da enciklopedieco: *nuraghe* ‘nurago’, *bersagliere* ‘bersaljero’ k.a. restas misteraj transskriboj sen klarigo, ankaŭ ne troveblaj en PIV. Iom da nekohereco oni trovas en kazoj kiel *primo* ‘unua’, ne tradukita kiel la substantiva ‘unua plado’, kontraŭe al *secondo*, kie ja ambaŭ signifoj aperas: ‘dua’ kaj ‘dua (ĉefa) plado’. Ankaŭ la vinkolekto bezonus kompletigon: kontraŭ abundaj piemontaj vinoj, mankas famaj centritalaj kiel Chianti, Orvieto.

Turnante nin al aliaj semantikaj sferoj, malpli frandigaj, sed profesie pli familiaraj al unu via recenzanto, ni denove konstatas grandan kompletecon. Tamen, *lancio* estas ne nur komerca termino, sed ankaŭ teknika/militista (‘lanĉo’); kvankam *vettore* kaj *lanciatore* estas vaste uzataj en la teknika itala por esprimi ‘raketo’, ili ne estas listigitaj en ĉi tiu senco. La traduko ‘eŭskera’ de *basco* ne sekvas la indiĝenan preferon por ‘eŭska’, kvankam *èuscaro* tradukiĝis kiel ‘euska’ (kun erara ‘u’). Sed ni ne serĉu kudrilojn en fojnostako...

La italaj kapvortoj estas amase akompanataj de ekzemplaj frazoj, esprimoj, idiomaĵoj kaj proverboj kun E-tradukoj/ekvivalentoj. Komparante la kvanton de tiaj garnaĵoj kun tiuj listigitaj en *Repertorio Fraseologico Italiano* (“Frazeologia esprimaro itala”), uzata en la Lejdena universitato, oni konstatas ne nur plenan redonon de ĉi lasta, sed ofte 50% pli da esprimoj.

La prezentmaniero de kapvortoj kun la respondaj tradukoj estas tre klara. De ĉiu kapvorto estas donita la vortospeco, kun aldonaj detaloj por substantivoj (genro) kaj verboj (transitiveco).

Amaso da utilaj propraj kaj fremdaj nomoj estas listigitaj alfabeto inter la komunaj nomoj. Homonimoj estas tre konvene apartigitaj, ekz. *ancora* (kun proparoksitona akcento), ‘ankro’, estas sekvata de la aparta kapvorto *ancóra* (paroksitona, kun malvasta ó), ‘ankoraŭ’, kaj *pèsca* (kun vasta è), ‘persiko’, sekvata de *pésca* (kun malvasta é), ‘fiŝkaptado’. La akcento — kaj la vasteco de la akcentita vokalo — estas ĉiam indikita, krom en sendubaj kazoj. Resume, la prezento estas klarega kaj nemisgvida. Ĝin antaŭiras, cetere, detala ĉapitro “Kiel konsulti la vortaron”, kiu — kiel ĉio enkonduka — estas plene dulingva: itala kaj Esperanta.

Malgraŭ la ĝenerale bela kaj klara grafika prezento, kelkloke malkaŝas sin la perkompuita kompostaĵo nekorektita de homa mano, ekz. en iu neallasebla vortdivido.

La itala esperantistaro kaj tiuj esperantistoj tutmonde kiuj regas aŭ studas la italan, devis atendi jardekojn, sed Minnaja regalas ambaŭ publikojn per riĉega kaj moderna trezoro, kiun multaj aliaj lingvokomunumoj envias.

Wim Jansen kaj Marisa Jansen-Miglioli (Nederlando)

Atende en la senfina tempo

La dezerto de la Tataroj. Dino Buzzati (1906-72). El la itala trad. Daniele Mistretta. Pisa: Edistudio, 1994. 172 p. 22 cm. Bind. 27,00 gld.

La aŭtoro estis precipe ĵurnalisto, raportisto kaj art-kritikisto de la plej fama itala ĵurnalo *Corriere della Sera*. Lia romana kaj novela produktado estis abunda, arkanta 40 jarojn. Li famiĝis ankaŭ kiel desegnisto de bildstrioj, verkisto de teatraĵoj, de operlibretoj, de bildalbumoj. Liaj ĉefaj trajtoj estis maltrankviligaj alegorioj, sciencfikciaj inventoj, metafizikaj (pseŭdo)realaĵoj; liaj paĝoj plenas je magia atmosfero kaj angora sento antaŭ ia paradokseco de la destino.

Tia estas la fono rolanta en *La dezerto de la Tataroj*, la plej fama romano de Buzzati, aperinta en 1940. Plej lasta fortreso, je la plej fora landlimo, gardas la landon de eventualaj atakontoj: oni timas invadon de tataroj, kaj la brava juna oficiro Giovanni Drogo pretas por ilin digne akcepti. La severe respektataj vaĉoj, la rigora kaj komplika soldata regularo, la trejniĝo skandas la tagon, la multajn tagojn, la senfinan tempon, atende al la malamiko kiu neniam venas. Mallonga forpermeso en la urbo konsciigas la protagoniston ke li perdis entute la kontakton kun la civila vivo: lia propra ekzisto ekevidentiĝas senutila, kaj je la reveno al la fronto Drogo ekmalsanas; sekvas lanta malfortiĝo kaj atendo de senglora morto, kiel senglora kaj senutila estis la vivo. Lasta bizara flagro: la tataroj, ŝajne, alvenas reale.

La sento de soleco, malgraŭ la amikeco kun samarmeanoj, la sento de senutilo malgraŭ la forta streĉo en la atendo, la daŭra kunvivado kun pensoj pri morto, la preskaŭ konstanta intermikso inter alegorio kaj realo, la ekstertera pejzaĝo: ĉio ĉi, pli ol la sinsekvo de la malmultaj eventoj, estas la kerno de la verko. La lingvaĵo perfekte adaptiĝas al ĉi sombra atmosfero, kaj granda merito de la tradukinto estas la redono de la karakteriza kaj ne facile tradukebla etoso.

Carlo Minnaja (Italio)

Vibro de profana spirito

Dekamerono. Unuaj tri tagoj. Giovanni Boccaccio (1313-1375). El la itala tradukis Perla Martinelli kaj Gaston Waringhien. Prilly: Kooperativo de Literatura Foiro, 1995. 320p. Bind. 76,50 gld.

Dekamerono, kompletigita proksimume en 1353, ŝajnas heroldi la aperon de la renesanca mondo per sia aparta vibro de profana kaj frivola spirito, per sia senkaŝa antiklerikalismo, kiu tamen rivelas sufiĉan prudenton por ne kritiki la sanktajn dogmojn de la katolika doktrino, kaj per sia realisma maniero reflekti la vivon kia ĝi estas. Ĝi konservas ĝis nun la freŝon de siaj roluloj kaj de ties peripetioj, kaj kvankam kelkaj el ĝiaj rakontoj montriĝas tro artifike konstruitaj, tamen multaj aliaj rakontoj plenas de amuzaj situacioj similaj al intrigoj de modernaj skeĉoj kaj vodeviloj.

Bedaŭrinde ke ni disponas nur 30 el ĉiuj 100 rakontoj de *Dekamerono* en Esperanta vesto, kaj des pli bedaŭrinde ke la traduko de nia priplorata Waringhien ne plene kontentigas pro lia rigora, preskaŭ sklaveca, teniĝo al la litero de la originalo, ĉefe en ĉio rilata al la konstruo de la frazo.

Vere, li sukcesas redoni la ritmon kaj la tonon de la originalo, sed je la kosto konstrui Esperantan prozon pezan kaj knaran, pli proksiman al Ŝulco ol al Kabe. Foj-foje la leganto perdiĝas en la meandroj kaj sinuoj de longegaj, plurpropoziciaj frazoj kaj de konstantaj verboformoj kunmetitaj. Ili eĉ belas en retorikaj lingvoj kiel la hispana aŭ la itala, sed tute ne kongruas kun la slava spirito de Esperanto.

Krome, kelke da lingvaj preteratentoj de Waringhien ne sukcesis vidi kaj korekti s-ino Martinelli kaj ties kompetenta grupo de kunlaborantoj. Ekz. sur p. 50, linio -5 legiĝas: "neniu preĝejo volos akcepti lian korpon, kiun oni tiam ĵetus al la putrejo, kiel *hundo*." Sur la sama paĝo, l. -2: "... kaj tiel ne absolvita li same *estos ĵetata* en la putrejon." Ĉu Waringhien atista? Plej certe temas pri pres-eraro! Ankoraŭ aliaj

preteratentoj de Waringhien estus registreblaj, sed ne valorus la penon fari plenan liston, ĉar ja peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro.

Ĉi *Dekamerono* enhavas ankaŭ, kiel prefacon, la eseon "Pri la arto noveladi" de Mario Luzi, tradukitan de Giorgio Silfer. Ĉi prefaco prezentas al mi absolutan galimacion. Kaj se eble ekzistas en la mondo superinteligenta samideano kapabla ekspiki, per simplaj vortoj kaj frazoj, la sencon kaj la esencon de tiu labirinta eseo, mi lin petas ke li iluminu min per sia enviinda intelekta sagaco.

Pri tiel esotera teksto mi ne kuraĝas opinii ĉu *neŭtra* (p. 7, l. 17) estu *neŭtrala*; ĉu *envolvebla* (p. 7, l. -5) signifas fakte *engagebla*; ĉu en *kompozita strukturo* (p. 10, l. 17), *kompozita* havas ian rilaton kun kompozitacoj aŭ kun ionikaj volutoj ktp.

La antaŭparolon, sobran kaj senpretendan, verkis Waringhien. Al la plumo de s-ino Martinelli ŝuldiĝas la artikoleto "Pri la traduko de Dekamerono", kie ŝi uzas *konkludi* anst. *fini* (p. 299, l. -12), *praktike* anst. *fakte* (p. 299, l. 4), *sia* anst. *lia* (p. 301, l. 3). Sur p. 301, l. 15-16, ŝi skribas: "La *afliktiga* forpaso de Gaston Waringhien antaŭ la *konkludo* de la longa laboro..."

Se konsideri ĉi stumblojn, aparte de aliaj ne menciitaj; se konsideri ke s-ino Martinelli tradukis nur unu rakonton, dum Waringhien tradukis la ceterajn dudek naŭ... nu, kiarajte aŭ kiamerite ŝi metis unualoke sian nomon, super la nomon de Waringhien, en la mencio — titolpaĝe kaj librodorse — de la tradukintoj de la verko?


Sed la volumo paradas per laŭdinda aspekto, solida bindo, bona papero kaj klara preso.

Fernando de Diego (Pollando)



"... la glora urbo Florenco, belega pli ol ĉiuj en Italio..."

Laste aperis



Al juna amiko. Grigorij Dolgin. Odeso/Moskvo: Viniti, 1996. 159p. 21cm. Kun muziknotoj kaj ilustraĵoj de N. Kravcova. Parte dulingva (rusa-E). Porinfanaj poemoj kaj kantoj. 7,50 gld.

Bib la koalido: Lagotago. Christopher Eaton. Kolore ilustris Vanessa Eason. El la angla trad. Gaye Phillips. Adelaide: National Parks Foundation of South Australia, 1996. 22p. ISBN 0-9590216-0-4. 18x20cm. Trilingva: angla, japana, Esperanta. Pri portempa malapero kaj saviĝo de eta koalo, por infanoj. 6,00 gld.

Esperanto: Curs rapid de învățare a limbii internaționale fără profesor. Mihai Trifoi (1944). Sfântu Gheorghe, 1996. 40p. 30cm. Enkonduka lernolibro, kun gramatika metodo, por rumanlingvanoj. 17,40 gld.

Esperanto: Ideologio kaj kulturo. D-ro Willem Verloren van Themaat (1931). Kun kelkaj modifoj kaj aldonoj de G. Berveling. Esperanto Nederland, 1996. 22p. ISBN 90-803 226-3-6. 21cm. Pri la ideologio de mondlingvaj movadoj kaj pri kultura valoro de diversaj lingvoj. 2,70 gld.

Esperanto i glóssa tis elpídas ("Esperanto, la lingvo de la espero"). Kóstas G. Kiriákos (1945). En la greka. Athina-Jánnina: Dodóni, 1995. 786p. ISBN 960-248-696-1. 25cm. Ilus. Enciklopedie riĉa verkego pri Esperanto: ĝiaj historio, movado, literaturo, elstaruloj ktp. 75,00 gld.

Esperanto-kurso por perfektigi. Petko Arnaudov (1931). Pazarĝik/Veljingrad: E-So-

cieto "Radio"/E-Societo "Stojo Kalpazanov", 1996. 109p. 20cm. Tekstoj, ekzercoj, klarigoj kaj metodikaj konsiloj. E-bulgara vortaro kun ĉ. 2500 radikoj. 24,90 gld.

Esperanto leerboek (1952). C.B. Zonder-van (1899-1983), Dr. W.J.A. Manders. Den Haag: Esperanto Kultura Servo, 1995 (reprezo de la 7-a eld. el 1991). 135p. 21cm. Ringe bind. 32-leciona lernolibro kun ampleksa ekzercaro, uzebla de personoj kun ĝenerala kono pri gramatikaj nocioj. 18,00 gld.

Esperanto. Van taalproject tot levende taal. Nederlandlingva. Esperanto Nederland, 1996. 22p. ISBN 90-803 226-1-X. 21cm. Ilus. Informbroŝuro precipe pri la historio de la lingvoproblemo, la artefaritaj lingvoj kaj Esperanto. 4,50 gld.

Germanaj biero kaj bierkulturo. Sciindaĵoj pri valora trinkaĵo. Harald Schicke (1953). Buchholz: MZ-Verlag, 1995. 130p. ISBN 3-89240-095-4. 21cm. Ilus. Manlibro pri "unu el la malmultaj tute naturaj trinkaĵoj", kiel ĝi estas farata en Germanio. 21,00 gld.

Helpo kaj saniĝo per spiritaĵ fortoj. Informkajero. Kompilis Ch. kaj M. Fortmann. El la germana trad. Detlef Meier. Alteglöfshheim: Grete Häusler Verlag, 1996. 32p. 21cm. Pri la instruoj de Bruno Gröning kaj lia Amikaro. 4,20 gld.

Internacia poŝtservo. Tarptautinė pašto tarnyba. Algimantas Piliponis (1943). Redaktis Adomas Vaitilavičius. Vilnius: Lietuvos Poštas, 1996. 350p. ISBN 9986-9078-0-2. 21cm. Bind. Pošta terminaro litova, franca,

angla, Esperanta, rusa, germana. 1305 terminoj. 39,00 gld.

Kie penso, tie mondo (ĉ. 1923). DEGUĈI Hidemaro (1897-1991). Dulingva. El la japana trad. Ŝigeki Maeda. Kameoka: E-Propaganda Asocio de Oomoto, 1993. 64p. 21cm. Frazoj skribitaj "unuspire laŭ fontantaj ideoj", el notkajeroj de gvidinto de la japana religio Oomoto. 7,80 gld.

Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. Josef Kavka (1922). Dobřichovice: Kava-Pech, 1996. 32p. ISBN 80-85853-23-X. 21cm. Ekzameno de kazoj kiam la emo eviti homonimecon kaŭzas terminologiajn problemojn. 4,20 gld.

Latina jako mezinárodní jazyk. Vera Barandovská-Frank (1952). Dobřichovice: Kava-Pech, 1995. 84p. ISBN 80-85853-13-2. 20cm. Ĉeĥalingva. Monografio pri la estinteco, nuno kaj pluo de la latina lingvo. 4,50 gld.

Leksikono Esperanto-Français-English-Nederlands-Deutsch. Jean P. Bovy. Wilrijk: Kariljono, 1996 (neindikita). 105p. 30cm. Mimeo. Ringe bindita. Ĉirkaŭ 4500 E-radikoj kun ekvivalentoj en kvar lingvoj. 33,00 gld.

Malgranda kurso pri HTML. Informbroŝuro por nefakuloj. Paul Peeraerts (1946). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1996. 20p. 21cm. Konsilaro por konstrui informpaĝojn en la Tut-Tera Teksaĵo. 6,90 gld.

Mil unuaj vortoj en Esperanto. Heather Amery. Londono: E-Asocio de Britio, 1994. 62p. ISBN 0 902756 16 8. 31cm. Ilustris Stephen Cartwright. Kolora bildvortaro por diversaĝaj infanoj, kun babiligaj kaj ridigaj situacioj. 16,50 gld. (Aĉetebla ankaŭ bindite, 31,50 gld.)

Per amo al amo. Hadewijch (ĉ. 1200-1269). El la nederlanda trad. Wouter F. Pilger. Breda: Voĉoj Kristanaj, 1996. 32p. 21cm. Daŭre admirataj poemoj de mezepoka nederlanda mistikulino. 6,60 gld.


Ŝtupo post ŝtupo. Ŝtuplibro por esperantistoj al la prospera uzo de Esperanto. József Baksa (1958). Zalaegerszeg: Prospera Linio-Unuiĝo, 1996 (2-a, reviziita eld.). 160p. 15cm. Praktika konsilaro por "prosperigi Esperanton kaj tiujn, kiuj uzas ĝin". 10,50 gld.

DIVERSAĴOJ

Glumarko "UK Adelajo". Diametro 36mm. Folio da 10 pecoj. 3,00 gld.

Sonkasedo: Emilo de Smolando. Astrid Lindgren (1907). Legas Harold Brown. El la sveda trad. Kerstin Rohdin kaj Harold Brown. 1996. Aventuroj de petoleto, sed bonkora knabeto. De la aŭtoro de *Pipi ŝtrumpolonga*. 21,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



ZAMENHOF BILDRAKONTE DE G. TILLEUX, B. DISANO KAJ J. M. DERZELLE. ELDONITA EN PLURKOLORA PRESO ĈE LA JAMA LIBREJO SONORILLO, NUN KONTRAŬ RABATITA PREZO DE 15,00 GLD. TRIONA RABATO EKDE 3 EKZEMPLEROJ.

Festi lingvojn per fulmokursoj

La usona esperantisto Dennis Keefe, konsilisto pri lingvoinstruaj programoj en Usono kaj Francio, elpensinto de la E-kurso BEK, vivas en Tours (Francio). Tie li okazigis en pasinta marto, jam duafoje, la eventon LinguaFest' (LingvoFesto). Ties vizitantoj povas partopreni ekspresajn kursojn kiuj enkondukas al dekoj da konataj kaj malpli konataj lingvoj, i.a. Esperanto.

Kio igas LingvoFeston unika?

Ekzistas ja t.n. "festivaloj de lingvoj", sed ili kutime estas miksaĵo de muziko, danco, manĝaĵoj, kulturo, kaj eventuale iom pri lingvo. En LingvoFesto kernas la lingvoj mem. Tio estas malofta; mi neniam aŭdis pri festivalo kun tiom da lingvoj instruataj.

Kio inspiris la ideon de tiu festo?

Multe da inspiro venis el miaj konversacioj kun J. Milton Cowan, kiu dum la dua mondmilito estris la lingvoprogramon de la usona armeo, kaj poste tiun de Universitato Cornell. Li kutimis uzi personojn kiuj neniam antaŭe instruis lingvon. Je la Esperanta flanko, LingvoFesto ĉerpis sian principon el Muestra de Esperanto ("Ekmontro de Esperanto"), organizita unue en 1980 ĉe la Madrida Liceo de Esperanto sub la gvido de Augusto Casquero. Laŭ tiu principo, oni unue montru al la publiko iom pri Esperanto, resp. pri multe da lingvoj, kaj poste iuj deziros lerni la lingvo(j)n.

Kion fakte celas la aranĝo?

La ĉefa celo estas ke ĉiuj — la publiko, la instruantoj kaj la helpantoj — distriĝu. Aliaj celoj estas pli konigi multajn neinstruatajn lingvon (el la 67 lingvoj de LingvoFesto '96 nur ses aŭ sep estas instruataj en nia regiono de Francio) kaj interkonatigi eksterkaj hejm-landanojn. Por multaj la festivalo estas la ununura okazo ekkoni samregionanojn eksterlandajn.

Kiel vi varbis la instruistojn de la diversaj lingvoj?

Por trovi 70 instruantojn de 67 lingvoj mi pridemandis inter 200 kaj 300 personojn kaj sendis pli ol 400 leterojn, 140 el ili al ambasadoj en Parizo. Tamen el ambasada fonto venis nur du instruistoj! Multajn mi invitis el universitatoj, profesorojn kaj studen-

tojn. En centroj por enmigrintoj mi trovis la instruantojn, ekzemple, de la albana, somalia, kurda kaj ukraina lingvoj. Esperanton instruis, cetere, Dominique Baron.



Dennis Keefe

Ĉu estis profesiuloj inter la instruistoj?

Malpli ol 20 procentoj. La plejparto neniam instruis sian lingvon.

Ĉu lokaj esperantistoj kunlaboris?

Sen ili LingvoFesto neniam estus okazinta! El la 9 ĉefaj helpantoj 8 parolis Esperanton.

Kiel vi klarigas la relative altan ŝaton de Esperanto ĉe la publiko?

Efektive, laŭ partopren-ciferoj ĝi estis la kvina plej vizitata lingvo el 32 lastjare kaj la sepa el 67 ĉi-jare. Nu, la publiko venis por vidi ion novan, ion nekutiman, kaj por la plejparto Esperanto estis tia. Se Esperanto ĝuus pli da reklamado, ni vidus eble eĉ dek aŭ dudekoble pli da lernantoj.

Ni scias ke post la du festivaloj novaj lernantoj de Esperanto anonciĝis. Sed ĉu ankaŭ aliaj lingvoj de LingvoFesto akiris novajn lernantojn?

Ho, jes! Eĉ multe pli ol Esperanto. Ekzemple 15 personoj iris al kursoj pri la araba, kaj dekoj da homoj ekinteresiĝis pri mansigna lingvo.

Ĉu la aranĝo estas memfinanca?

Preskaŭ. En 1996, por la dua LingvoFesto, mi konscie rifuzis financon helpon. Mi deziris montri ke io povas sukcesi sen publika mono. Ni uzis nenian subvencion, krom 6500 frankoj [ĉ. 2100 gld.] de la banko Crédit Agricole por anonc-afiŝoj. Flanke, ni ricevis po 400 frankojn de kelkaj asocioj, lingvolernejoj ktp, kiuj starigis dutagan standon en la festivalo. Mi mem elspezis proks. 4000 frankojn el propra poŝo. Mi pensas ke ni havis la plej grandan aktivaĵon en Tours sen monhelpo. Tamen, nun ke mi montris la eblecon de festivalo sen subvencio, ni povos fari kiel aliaj grandaj festivaloj, kiuj ja uzas subvenciojn.

La populareco de la aranĝo salte kreskis de 1995 al 1996: 780 gelnantoj pasintjare, pli ol 2300 en 1996. Kiel vi klarigas tion?

Laŭ enketo kiun ni faris kun partoprenintoj de la festivalo, la plimulto venis pro rekomendo de amiko aŭ konato kiu vizitis en la unua jaro!

Ĉu vi antaŭvidas pluan kreskon?

Jes. Kiam la lernejoj finfine vidos la kulturalan valoron de la afero, estos eble kvin aŭ dek mil partoprenantoj jare.

Kiam okazos la tria LingvoFesto?

En marto 1997, same en Tours. Sed sciu ke ĝi estos la tria granda. Intertempe oni aranĝos aliajn festivalojn malgrandajn. La ideo rapide populariĝas, nun vilaĝoj kaj kvartaloj deziras fari sian propran lokan festivalon.

Ĉu do aliaj urboj povus fari siajn proprajn LingvoFestojn?

Mi havas la kopirajton por la nomoj LingvoFesto kaj LinguaFest'. Tamen iu ajn skriba petanto povos uzi ilin senpage por almenaŭ unu jaro — aŭ uzi similan nomon sen peti mian permeson. Mi baldaŭ diskonigos trarete mian konsilaron pri sukcesa organizado de Festivalo de Lingvoj. ★

Por pliaj informoj pri LingvoFesto, kontaktu: <http://www.geocities.com/Athens/5183/> aŭ dekeefe@lenet.fr.



Estas tempo rekotizi por 1997!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!

Pioniro obstina kaj eltenema

La 90-jariĝo de Germana E-Asocio en 1996 samtempas kun la 130-a naskiĝdatreveno de grava aganto de la germana kaj internacia E-movado: prof. d-ro Johannes Dietterle. Pri lia vivo esploras la nepo, d-ro inĝ. Hans-Burkhard Dietterle. Resuman tradukon de la germana originalo faris Detlev Blanke.

Johannes Dietterle naskiĝis la 7-an de aŭgusto 1866 en Chemnitz. Post studo de teologio, filozofio, pedagogio kaj orientaj lingvoj en la universitato de Lepsiko kaj doktorigo, ekde 1889 li laboris en diversaj lokoj de Saksio kiel instruisto, diakono kaj pastoro. En 1907 li ekloĝis en Lepsiko, daŭrigante la instruistan laboron kiel stud-konsilisto en lernejo por knabinoj. La profesian karieron akompanis verkado pri religiaj, literaturaj, filozofiaj, kulturaj kaj region-historiaj temoj. Post interesiĝo pri Volapuko, Dietterle sin turnis al Esperanto. Li fariĝis komitatano de Germana E-Societo, fondita en 1906. En 1908 li eklaboris sub gvido de d-ro Albert Schramm en la Reĝa Saksa Esperanto-Instituto, okupiĝante pri la kreo kaj funkciigo de ŝtate agnoskitaj ekzamenaj komisionoj. Post la translokiĝo de la instituto al Lepsiko kaj la demisio de Schramm, Dietterle fariĝis ties provizora kaj ekde 1916 plenrajta direktoro. Kiel siajn ĉeftaskojn li rigardis i.a.

1. vastigi al tuta Germanio la ekzamenan sistemon elproviditan en Saksio;
2. akiri subtenon de koncernaj registaraj eduk-instancoj por la disvastigo kaj instruado de Esperanto;
3. subteni internaciajn instancojn de la E-movado per germanaj kompetentuloj (ekz. la Akademio de E-o);
4. organizi naciajn kaj internaciajn didaktikajn eksperimentojn;
5. okazigi statistikadon pri la tutmonda E-movado kaj ĝia evoluo.

La kreskantan agnoskon al la laboro de Dietterle montras i.a. la promocio de la instituto al Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko kaj ĝia subordigo al la germana ministerio pri internaj aferoj.

Dietterle havis multajn gravajn funkciojn enlandajn kaj internaciajn. Menciindas lia prezidanteco de la 15-a UK en Nurenbergo (1923), membreco en la Centra Esperantista Komitato¹ (por instruado, literaturo, statistiko)

kaj vicprezidanteco de la Akademio de Esperanto. Li krome prezidis la Interfoiran Komisionon² kaj vicprezidis la tegmentan organizaĵon de la lokaj E-grupoj en Lepsiko.



Johannes Dietterle (1866-1942)

En 1923 li fru-pensiuliĝis, ne plu publikigis pri temoj ekster Esperanto kaj sin plene dediĉis al Esperantaj laboroj institutaj kaj aliaj.

Malgraŭ la konstantaj financaj problemoj de la Instituto, dank' al siaj obstino kaj eltenemo, Dietterle sukcesis daŭre pliampleksigi la laborojn kaj aparte evoluigis kun la instruistaro la ekzamenan fakon. Li bone kunlaboris ankaŭ kun laboristaj e-istoj. Johannes Dietterle tre kritike rilatis al inerteco, malklerado kaj suprajeco — ofte konstateblaj en la movado —, tre akre sin esprimis pri tio buŝe kaj koresponde, tamen ĉiam montrante vojojn por venki la misojn. Dum jaroj li ekzemple kontraŭbatalis la movadan heziton pri kaj eĉ malakcepton de la sciencaj klo-

podoj de Eugen Wüster. Ke la fondonto de la terminologi-scienco ne rezignaciis jam tre frue kaj donis sian grandan sciencon kaj vortaristan kontribuon al E-o, tio dankeblas ankaŭ al la aparte bonaj rilatoj de Dietterle al li.

Post komencaj hezititoj, ekde 1927 Dietterle sin forte engaĝis por International Auxiliary Language Association (Internacia Helplingva Asocio, IALA³) kaj organizis por ĝi vastan subtenon. Por li estis eksterdubo ke la studoj de IALA klare favoros Esperanton.

La ĉefverko de Dietterle estas la eldono de *Originala Verkaro* de Zamenhof (1929). Li krome verkis diversajn lernilojn, studojn kaj eseojn en Esperanto kaj la germana.

Komence de la 30-aj jaroj la ekonomia krizo sekvigis kompletan ĉeson de ĉia financa subvencio al la instituto. Kreskis la politika premo en Germanio kontraŭ la E-movado. Elĉerpita, Dietterle rezignacie demisiis en 1932 kaj ŝajne apenaŭ plu elpaŝis pri E-o ĝis sia morto la 1-an de novembro 1942, en Radebeul ĉe Dresdeno.

Li apenaŭ plu tenis kontaktojn kun unuopaj esperantistoj. Mankas ajnaj skribaj notoj de li pri lia esperantista agado post 1932. Same mankis testamento por lia familio.

D-ro Hans-Burkhard Dietterle, Wilhelmstr.1, DE-16321 Schönau, Germanio

NOTOJ

1. Poste Internacia Centra Komitato, fondita en 1922 kiel kunordiga instanco de la neŭtrala E-movado.

2. Fondita post la unua mondmilito por kunordigi la E-agadon ĉe internaciaj foiroj.

3. IALA (1924-53) celis studi la problemon de internacia helpa lingvo kaj mondwide akceptigi elektotan sistemon. Publikigis en 1951 Interlingua, la sistemon de sia tiama direktoro Alexander Gode.

Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario

Per- sone



• Gorbačov: AIS-profesoro

“Nur de hodiaŭ mi vere rajtas senti min ano de AIS”, diris Miĥail Gorbačov la 20-an de septembro, dum vizito en Nordrejn-Vestfalio, kunvenante kun la prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj, prof. d-ro Helmar Frank, kaj kun prof. d-ro Reinhard Selten, Nobel-premiito, kunfondinto kaj honora senatano de AIS. Gorbačov aludis al la t.n. alvokdecido de la senato de AIS, okazinta pasintan marton (vd. jul-aŭg., p. 139). Li anoncis sian kunlaboron kiel profesoro de la teknika-praktika sektoro, kune kun sia internacia Fondaĵo Gorbačov pri socia, ekonomika kaj politika esplorado. Li aprobis la ideon de AIS labori por longtempaj celoj, nelaste por demokratia solvo de la internacia lingvo-problemo: “La intelektuloj de la

mondo devas interkomuniki kaj interkonsenti, alie la politikistoj faras sensencaĵojn. Mi scias tion.” (AIS)

• Koutny: Ne plu en Budapeŝto

Ilona Koutny, kiu ĝis la pasinta jaro instruis ĉe la Esperanta fako de Universitato ELTE en Budapeŝto, nun ekloĝis kun sia edzo, Zbigniew Galor, en Pollando. Ilia adreso: Poniatowskiego 3, PL-62-020 Swarzędz; ☎ +48/61/172-873; ikoutny@hum.amu.edu.pl. Ŝi instruas en la Lingvistika Instituto de Universitato Mickiewicz en Poznań kaj ankaŭ gvidas Esperanto-kurson en la nuna studjaro.



• Lapenna: Fondaĵo, informpaĝo

Stipendio Ivo Lapenna, kiun Fondaĵo Lapenna (lapenna@cybernet.dk) starigis memore al sia nomdoninto (1909-1987), subvencios en 1997 universitat-nivelajn disertaciojn (doktorigajn, magistrigajn, licenciacajn) oficiale akceptitajn de universitata instanco en 1996, kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko, kaj estas ellaboritaj en la spirito de Zamenhof kaj Lapenna. Detala regularo: Torben Svendsen, Vanlose Allé 57, DK-2720 Vanlose, Kopenhago, Danio. La disertaciojn sendu en du ekzempleroj antaŭ la fino de februaro al d-ro Klaus Perko, Lendkai 111, AU-8020 Graz, Aŭstrio. (K. Perko)

Fondaĵo Ivo Lapenna havas ankaŭ TTT-paĝon ĉe <http://www.worldnet.net/~bmasala/FIL/>, kun informoj pri verkoj de Lapenna en Esperanto, biografiaj notoj Esperantaj kaj anglaj, kaj prezento de la Fondaĵo. (T. Svendsen)

• Reza: Japana preleg-ĉampiono

Inter la 118 partoprenantoj el 30 landoj de la 37-a internacia prelegkonkurso japanlingva (22 jun.), unu el la plej bonaj 12 montriĝis Reza Kheir-khah, kiu pritraktis la temon “Azio kaj la komuna lingvo”. La tutlanda televido NHK elsendis la prelegojn la 9-an kaj 10-an de julio. Reza prezentigis kiel profesia esperantisto irana, kiu vojaĝis al multaj landoj kaj nun laboras en Japanio rilate al Esperanto.

• Ŝtimec: Sur medala fronto

En la ĉi-jara ekspozicio de Internacia Asocio de Medalistoj (FIDEM) en Neuchâtel (Svislando), la kroatan medalarton reprezentis verko de Ante Despot, bronza medalo kiu portretas la E-verkistinon Spomenka Ŝtimec.

• Verloren van Themaat: Duobla surprizo

Okaze de sia retiriĝo kiel estro de la nederlanda rebat-servo, d-ro Willem Verloren van Themaat estis duoble surprizita dum la Faulhaber-semajnfino (Elspeet, 5-6 okt.): la asocio Esperanto Nederland eldonis lian eseon *Esperanto: kulturo kaj ideologio*, kaj fondis premion kun lia nomo, kiu estos ĉiujare donita al tiu esperantisto kiu atingos la plej trafan prezenton de Esperanto en amas-komunikiloj.

Abontarifoj 1997 de la Libroservo de UEA prezoj en nederlandaj guldenoj

Revuo	n-roj jare	jar- tarifo	Revuo	n-roj jare	jar- tarifo
Boletín (hispana)	6	50,00	Kancerkliniko, La (ajnista)	5	42,00
Brazila Esperantisto	4	33,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		8,00
Brita Esperantisto, La	6	42,00	Koncize (okc-eŭropa junularo)	6	20,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		10,00	Kosmos (filozofia)	4	30,00
Bulgara Esperantisto	6	25,00	Language Problems and		
Dia Regno (KELI, aere)	12	21,00	Language Planning	3	77,00
Dua Jarcento, La	4	33,00	<i>institucioj</i>		167,00
Ekonomia Bulteno pri Usono	12	25,00	Lanterno Azia, La (korea, aere)	11	25,00
El Popola Ĉinio (aere)	12	51,00	Literatura Foiro	6	62,00
Esperanto, L' (itala)	9	43,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		18,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		6,00	Litova Stelo	6	20,00
Esperanto sub la Suda Kruco			Medicina Internacia Revuo		
(aŭstralia-novzelandaj, aere)	6	55,00	(aere)	2	25,00
Esperantolehti (finna)	6	26,00	Monato (int. novaĵrevuo)	12	76,00
Espero, La (sveda)	6	39,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		11,00
Espero Katolika (IKUE)	6	65,00	Monda Forumo (Unesko k.s.)	4	30,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		10,00	Moskva Gazeto	6	18,00
Fonto (literatura, aere)	12	45,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		4,00
Franca Esperantisto	11	67,00	Najtingalo (kasada songazeto)	2	40,00
Gazeto, La (mondkultura)	6	56,00	Norvega Esperantisto	6	21,50
<i>aerpoŝta aldono</i>		10,00	Ondo, La (rusa, soci-kultura)	6	28,00
GEJ-Gazeto	6	20,00	Oomoto	1	20,00
Heroldo de Esperanto	16	62,00	Riveroj (beletra)	4	30,00
(<i>aerpoŝta aldono varias laŭlande</i>)			Ruslanda Esperantisto	12	24,00
ICEM-Esperanto			Scienco kaj Kulturo	4	42,00
(Freinet-pedagogio)	4	40,00	Sennaciulo/Sennacieca Revuo	12	106,00
Internacia Pedagogia Revuo	4	30,00	Simpozio (filozofia)	2	10,50
Jaro, La (agendo)	1	10,00	Starto (ĉeĥa)	6	16,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		4,00	TEJO Tutmonde	4	20,00
Juna Amiko (por lerneĵanoj)	4	19,00	Tutmondaj Scienco kaj Tekniko	4	28,00

Por mendoj de klientoj loĝantaj en Eŭropa Unio, aldoniĝas Aldonvalora Imposto je 6%.

Fake



• Eŭropa agado: EEU renoviĝas

En la Praga UK, la nova prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio — kunliganta la landajn asociojn de UEA en la 15 EU-landoj — fariĝis TEJO-vicprezidanto Jimmy Stryhn Meyer (stryhn@dorit.uhi.ku.dk). Akceptiĝis la propono ke la Eŭropa oficejo de TEJO en Bonn ekfunkciu ankaŭ kiel EEU-oficejo, kun sekretario Miquel Gómez i Besòs (tejo_oficejo@bn.maus.de). EEU krome decidis ĝisdatigi sian statuton laŭ la nuna situacio en la 15-membra EU kaj krei statuson de observanto por orient-eŭropaj E-asocioj. (A. Ritamäki, *ESPERANTO aktuell*)

En Budapeŝto aperis aŭtune 160-paĝa libro, *Az egyesülő Európában társalogjunk vagy dadogjunk?* (“Ĉu interparoli aŭ balbuti en la unuiĝanta Eŭropo?”) de la E-aktivulo László Gados (marto, p. 50), pri la procezo de la eŭropa integriĝo kaj ties lingvaj aspektoj. Duono de la verko pritraktas Esperanton kaj ĝian eblan rolon en Eŭropo.

• Instruado: Koresponda konkurso

Post plurjara sukceso Géza Kurucz (Gimnazio Júlia Bánai, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario) denove lanĉas la poentokolektan konkurson memore al István Szerdahelyi, ĉefe, sed ne nur, por anoj de baz- kaj mez-lernejoj kun E-instruado. La taskofolioj estas sendataj al la konkursantoj. La demandoj por plenkreskuloj aperas en *Eventoj* kaj estas voĉlegataj de Radio Vieno. (G. Kurucz)

• Komerco: Etaj entreprenoj

La raporto “Novaj merkatoj por et- kaj mez-grandaj entreprenoj” de Maurice Ruhl, pri la rezultoj de esploro komisiita de Komerca kaj Industria Ĉambro de Centra Gelderland, estas disponebla ankaŭ en Esperanto, dank’ al inĝ. Kees Ruig (“De Ruigehoek”, Groesbeekseweg 53, NL-6581 BJ Malden, Nederlando).


• Komputado: Diplomota KD-ROM

Studentoj Stefan Fisahn (fisahn@hbi-stuttgart.de) kaj Tilman Meierfrankfeld (meierfr@uni-muenster.de) atendas ĝis la 10-a de decembro E-lingvajn kontribuojn por KD-ROM titolita *EspeRom*, diplom-laboro de Fisahn, kiun Germana E-Asocio planas eldoni en 1000 ekzempleroj okaze de la Tria Eŭrop-Unia E-Kongreso (Stutgarto, 16-19 majo 1997). La disko enhavos tekstojn, bildojn, sonojn kaj video-filmerojn.

• Politiko: E-istaj parlamentanoj

Esperantisto Goran Jakovljević, direktoro de la urba muzeo en Bjelovar, estas ekde junio deputito de la departemento Bjelovar en la parlamento de Kroatio. La social-liberala politikisto (nask. 1957), kiu partoprenis ĉiujn IJK-ojn inter 1976 kaj 1981, volonte ricevis informojn pri Esperanto en parlamentanaj rondoj, pere de la redakcio de *Tempo* (p/a Kroatia E-Ligo, Amruševa 5, HR-10000 Zagreb; ivica.ivaci@public.srce). (S. Štimec)

Levente Bitay, UEA-delegito en Kluj (Cluj-Napoca, Rumanio), fariĝis en septembro membro de la parlamento, eĉ se nur por du monatoj (ĝis la novembraj elektoj). Li reprezentas Unuiĝon Demokratan de Hungaroj en Rumanio. Cetere, denaska e-istino Lizeta Kühlmann laboras de kelkaj monatoj kiel konsulo ĉe la dana ambasado en Rumanio. (I. Onę)



• Turismo:

Esperanto kiel lingva problemo

M. Heller, reprezentanto de Monda Turismo en Mikolajiv (Ukrainio) raportas pri “solvenda problemo” en la revuo *Helianto*: Esperantlingva kunlabora interkonsento de ŝtata turisma oficejo kun Monda Turismo ne ricevis la necesan notarian konfirmon, ĉar ĝia traduko en la ukrainan aŭ rusan devus esti farita de tradukisto diplomita pri Esperanto, kia mankas en Ukrainio.

Monda Turismo subskribis kontraktan kun Akademio Internacia de la Sciencoj, laŭ kiu ĝia “Internacia studumo pri turismo kaj kulturo” fariĝas ekde 1996/97 konstanta faka klerigejo de AIS pri turismo kaj kulturo.

Oni povas senpage mendi *Eta Mar-sejla Leksikono* de Centre Culturel d'Espéranto, Maison des Associations, 93, La Canebière, FR-13001 Marseille, Francio. (*La Domo*)

• Universitatoj:

La konkero de Casquero

Pro la sukceso de la E-kurso de Augusto Casquero de la Cruz (apr., p. 78), kiun finis 25 lernintoj, la filologia fakultato de la Universitato de Valencio decidis estigon de Instituto pri Modernaj Lingvoj, inter kiuj troviĝos Esperanto. (*Heroldo*)

Fondiĝis Esperanta Esplora Centro en Shijiazhuang (p/a s-ro Shi Yongning, Gongwai, Shida, CN-050016 Shijiazhuang). Ĝi esperas ke esperantologoj sendos al ĝi siajn disertaĵojn. (*El Popola Ĉinio*)

• Arto: CO ekspozicias

En la lasta semajno de aŭgusto la strato Nieuwe Binnenweg en Roterdamo fariĝis art-ekspoziciejo plurajn kilometrojn longa: kadre de la aranĝo Shop-Art (“Butik-Arto”), 212 butikoj disponigis senpage sian vitrinon al la sinprezento de 246 artistoj. La montrofenestron de la Centra Oficejo (surfote) ornamis Tanneke Barendregt per siaj artaĵoj rilataj al lingvo kaj komunikado: la akvareloj *La interparolo*, *Ĉiuj homoj*, *Aŭskulti*, *La alia flanko de la mondo*, kaj la desegno *Nekonata lingvo*. Ŝi gajnis laŭdan mencion.

Vlastimil BLAŽEK (1911-1996), honora prezidanto de la E-klubo en Olomouc (Ĉeĥio), aktivulo dum duona jarcento, mortis la 3-an de aprilo.

CHEN Baode (1917-1996), honora komitatano de Ĉina E-Ligo, vicprezidanto de Intern-Mongolia E-Asocio, forpasis la 13-an de majo.

Arthur Dawson FOOTE (1931-1996) forpasis en Dundee (Skotlando) la 9-an de junio. Esperantisto de la aĝo de 12 jaroj, li frue komencis verki kaj traduki poezion. Li "verkis multon sed malmulton eldonis" (W. Auld): krom en revuoj, li publikigis originalaĵojn en *Esperanta antologio* (1958) kaj tradukojn en la du volumoj de *Angla antologio* (1957, 1987).

Adonis GONZÁLEZ MEANA (1927-1996), vicprezidanto de Astura E-Asocio, vicdelegito kaj delegito en Oviedo kaj Gijón 25 jarojn, mortis la 4-an de aŭgusto.

Franz HAIDERER, 85-jara laborista E-aktivulo, mortis la 4-an de aŭgusto en Vieno. Batalinte en la hispana inter-civitana milito, li restis ĝis 1941 en la koncentrejo de Gurs (Francio), kie li kunaranĝis E-kursojn, kaj poste en Dachau ĝis 1945, kie li estis inter la animantoj de la subtera E-agado.

Karel JANOUŠ (1916-1996), esperantisto ekde 1936, ĉefa aktivulo dum multaj jaroj en Norda Moravio, komitatano (1982-87) kaj honora membro de Ĉeĥa E-Asocio, honora prezidanto de la Ostrava klubo, mortis la 21-an de marto.

Albert MARMENOUT (1916-1996), delegito en Knokke-Heist (Belgio), forpasis la 14-an de aŭgusto.



Annikki RANNISTO (1913-1996) mortis la 13-an de septembro. Ŝi estis vicdelegito (de 1953), poste delegito (1977-1991) kaj turisma fakdelegito en Tampere, estrano de la E-klubo Antaŭen dum 47 jaroj kaj UEA-membro dum duona jarcento.

Simone RAVENSTEIN (1930-1996), delegitino en Marsejlo, komitatano de la Provenca Federacio, mortis lastatempe.

Raymond ROSS (1916-1996), delegito en Brisbano kaj fakdelegito dudekon da jaroj, organizanto de multaj kongresoj kaj konferencoj, ofta instruanto, forpasis la 22-an de julio. Sekretario de Aŭstralia E-Asocio de 1988 ĝis 1995, li verkis historion de AEA

(*Esperanto en Aŭstralio*, 1985). Li estis la ĉefa motoro de Esperanto en Brisbano kaj en la Kvinslanda Federacio.

Jaime SCOLNIK (1908-1996), dumviva membro, dojeno de la esperantistaro en Kordobo (Argentino), mortis la 18-an de aŭgusto. Esperantisto ekde 1933, li kunfondis Argentinan E-Ligon en 1941, kaj funkciis kiel UEA-delegito inter 1937 kaj 1956. Pioniro de natura kuracado en Ameriko, li multe verkis pri tio kaj pri siaj multlandaj vojaĝoj en la hispana. En Esperanto li publikigis diversajn lernolibrojn en pluraj eldonoj ekde 1938 ĝis 1982 (unu kun sia fratino Rosa), krome la verkojn *Kiel kuracas la naturista medicino* (1961, tradukitan en plurajn lingvojn) kaj *Sanon! Kuracu vin mem per naturaj metodoj* (1995).

Sidney STEINBERG (1914-1996), dumviva membro, delegito pri komerco 15 jarojn, forpasis la 25-an de majo. Dum multaj jaroj li preparis jaran financon raporton pri la Novjorka Oficejo de UEA.

René VILLÉGIÉ (1920-1996), dumviva membro, mortis la 27-an de junio en Brison-Saint Innocent (Francio).

ANONCETOJ

Japana Esperanto-Korespondo-Servo ĉiam konstante akceptas korespondo-proponojn kun japanoj. Skribu unuope al ĝi: ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Por reenkarriĝa studo, mi pagos \$10 por listo de soldatoj de Luck, Ukrainio, kiuj batalmortis 1916-17. J. Gamble, 7046 SW Vermont Ct., Portland, OR 97223.

Anna Ritamäki kaj La Skolta Mondo ne plu loĝos en Peltolavägen. Ekuzu la konstantan adreson: Dragsfjärdsvägen 690 (aŭ Mattkärr), FI-25700 Kimito, Finnlando, ☎+358-2-423133, ☎2-423246, ✉aritamak@ra.abo.fi.

Tutkore dankas sendintojn kaj sendontojn François Masson, 11-jara (8 rue Roussel, FR-25000 Besançon) kaj Cédric Munnier, 20-jara (10 rue Capucines, FR-25000 Besançon), handikapuloj, bildkart-kolektantoj.

OFICIALA INFORMILO

PATRONOJ DE TEJO 1996

Belgio: Elvira de Coene. Francio: Jacques Decobert. Usono: Gigi Harabagiu.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Israelo: Josifa Rabino. Korea Resp.: Barry Savage.

DONACOJ 1996 (gld.)

ĝis la 30-a de septembro

Fondaĵo Afriko: Francio: P. Chavignon 248,15. Nederlando: Urbo Voorburg 1000,00. Sumo ĉi-jara 12 191,69.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: S.S. Ledon 139,00. Sumo ĉi-jara 4543,09.

Fondaĵo Canuto: Britio: P.A. Danning 25,00. Ĉeĥio: J. Pospíšil 19,81. Germanio: K.-E. Salzmänn 19,00. Japanio (por aziaj e-istoj): anonime 77,48; H. Hotta 30,99; T. Huzita 61,98; M. Ikemoto 61,32; M. Nakatu 30,99; Y. Sawaya 61,98; M. Toyoda 46,48; Y. Yazaki 30,99. Korea Resp.: E-Asocio de Kwangju 120,86. Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Sumo ĉi-jara 9392,75.

Ĝenerala Kaso: Germanio: K.-A. Bielenberg 50,00; W. Ehlers 12,32; E-Blindula Asocio 2237,10; O. Hub 559,50; H. Otto 44,80. Diversaj malgrandaj: 2,50. Sumo ĉi-jara 7420,71.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: N. Rašić 50,00. Sumo ĉi-jara 521,80.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: P.A. Danning 25,00. Germanio: K.-E. Salzmänn 19,00. Hispanio: J. Raposo Montero 20,00. Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Usono: D. Holland 189,00; R. Grossman 20,00; L.C. Harmon 13,00; W.R. Harmon 13,00; Memore al Gladys Hoover Nelson 42,25. Diversaj malgrandaj 5,00. Sumo ĉi-jara 3160,92.

Volontula Fondaĵo: Britio: P.A. Danning 25,00. Germanio: K.-E. Salzmänn 10,00. Hispanio: J. Raposo Montero 30,00. Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Usono: L.C. Harmon 10,00; W.R. Harmon 30,00. Sumo ĉi-jara 780,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KSTAKTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel
ke **KSTAKTO** estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KSTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**



Tendaraj tagoj tri kajeroj

- specife por junuloj 10- ĝis 14-jaraj
- speciale emfazas parol-kapablon
- alloge ilustrita de Pavel Rak
- kun notoj por instruistoj



**Verkis Stefan MacGill.
Eldonis ILEI/UEA/HJEA.**



Prezo: 12,00 gld. por la unua, 15,00 gld. por la dua kaj
18,00 gld. por la tria kajero. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA.

LA NOVA REALISMO

de Bruno Vogelmann

185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco
Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto.
Premio Deguĉi, Premio FAME. Tradukita en
26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj.
El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro,
pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

Por esti ĝisdata pri la
evoluo kaj faka literaturo
de interlingvistiko kaj
esperantologio

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda
Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la
kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

Post Mi vizitis grandan urbon
la juna togolanda esperantisto

Gbeglo Koffi
denove ĝojigas
tiuĵn, kiuj volas
scii pli pri la
vivo en afrika
lando.

De vilaĝo al ĉefurbo

Eldonis Fondaĵo Afriko de UEA. 32p. Prezo: 8,10
gld. (triona rabato ekde 3 ekz.). Mendu ĉe UEA.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 77,00 gld.
Institucia abono: 167,00 gld.
Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Kiel argumenti? Per faktoj. Kie trovi ilin? Ĉe CED!

En Esperanto, nemalhaveblaj konsultiloj:

Bibliografio de disertacioj pri E-o kaj interlingvistiko	159 p.	21,00
Suplemento	63 p.	7,20
Lingvistikaj aspektoj de Esperanto	76 p.	15,00

En aliaj lingvoj, elstaraj studoj: (kun resumo en Esperanto)

The Economics of Language Use	164 p.	22,50
Language as Barrier and Bridge (bind.)	141 p.	42,00
Language Behavior in International Organizations	155 p.	24,00
Language in Religion (bind.)	141 p.	42,00
Language Status in the Post-Cold-War Era (bind.)	152 p.	78,00
Overcoming Language Barriers: The Human-Machine Relationship	112 p.	22,50

Ĉiuj prezoj estas en guldenoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

ANONCU EN JARLIBRO 1997!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	120 gld.	240 gld.
Duona paĝo	220 gld.	440 gld.
Tuta paĝo	400 gld.	800 gld.
Kovrilpaĝo	800 gld.	1600 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj: 31-a de januaro 1997.

La Adelajda UK proksimiĝas...



...per
kanguruaj
saltoj!

**Atende al Adelajdo, plibeligu viajn
korespondaĵojn per la glumarko
de la 82-a Universala Kongreso!**

**Diametro 36mm. Flavo kaj verdo sur blua fono.
Folio de 10 glumarkoj: 3,00 gld.
Triona rabato ekde triobla kvanto.**

POCKET RABATO ESPERANTO DICTIONARY

La plej bona
nun po
nur
21,- gld.

Gesamideanoj!

VIA PROFESIO interesas nin. Indiku ĝin al ni!

TAKE - LA DOMO
RN 83 - Rue de Tiefenbach
FR - 68920 WINTZENHEIM
Donaceto atingos vin!



ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio